



EL POPOLA ĈINIO

中國報道

6

1986





Montoj en nubaro

Foto de ŬANG ŜOŬLJANG

Enhavo

Kongreso utila al la mondopaco	2
Elkoran sonon al la 71-a UK	3
KANTOJ:	
Verda, ho vi, stel'	5
Ĝoja kunven' ĉe l' Granda Mur'	7
POR LA 71-A UK: Xiyuan-hotelo volonte servos al vi	24
Pledo por la terminologia laboro	26
Rekomendoj pri la landnomoj	28
POR KOMENCANTOJ: Boato kaj fluanta akvo; Malbona fino de sorgo; Kanto kaj plumoj de pavo	29
ESP-NOVAĴOJ	64
Kien iros la reformado de la ĉina ekonomia sistemo?	9
Santoŭ — hejmloko de elmigrintaj ĉinoj kaj speciala ekonomia distrikto	20
TIBETO HIERAŬ KAJ HODIAŬ (17): Kulturado de nova klera generacio	46
Originala kultura foiro	40
Tricent-jara apoteko Tongĵentang	56
POR VIA SANO: Ok sanigaj ekzercoj (III)	45
MIKRONOVELOJ:	
Post ŝafbatalo	16
Lasta volo de urbeŝtrino	66
Paleoantropologo Ĝja Lanpo	58
Ora infaneco (Kolora bildoserio)	17
Tie ĉi parolas BYISK	14
EL REALA VIVO DE ĈINIO: En akvoriĉa loko	52
VOJAĜO TRA ĈINIO: Tri Gorgoj de Jangzi-rivero	30
ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: Ĉinaj klasikaj ĝardenoj	36
AMUZO	68
ĈINLINGVA KURSO	67
KURANTAJ AFEROJ	61
SUR LA KOVRILO: "Panjo, mi malsuprenglitis!"	Foto de JU GŬANGHŬA
INTERNE DE LA KOVRILO: Montoj en nubaro	Foto de ŬANG ŜOŬLJANG
INTERNE DE LA DORSKOVRILO: Statuo de militisto-servisto kaj skulptita kapo de bodisatvo	
SUR LA DORSKOVRILO: Tigro en monto (Ĉinstila pentraĵo)	de LI GŬANGLI

JARABONTARIFO		Britio	£	8.00	Japanio	Yen	3000	Svisio	SF	25.00	
Aŭstralio	\$A	14.00	Finnlando	Fmk	64.00	Jugoslavio	Din.	500	Usono	US\$	12.00
Aŭstrio	Sch	200	Francio	FF	90.00	Nederlando	Gld.	34.00	Kanado	Can\$	13.00
Belgio	BF	550	Hispanio	Ptas	1200	Nov-Zelando	NZ\$	20.00			
FR Germanio	DM	30.00	Italio	Lit	18000	Portugaliao	Esc	1100			
Por aliaj landoj en Eŭropo:		£	8.00	US\$	10.00	Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko: £ 5.00 US\$ 6.50					



Huang Hua

HUANG HUA:

KONGRESO UTILA AL LA MONDPACO*

— Bondeziroj al la 71-a UK

1986 estas deklarita de la Ĝenerala Asembleo de UN kiel la Internacia Jaro de Paco. En la sama jaro okazos la 71-a Universala Kongreso de Esperanto en Pekino, la ĉefurbo de la Ĉina Popola Respubliko. Tio ja estas signifplena afero.

Prevento de nova mondmilito restas ankoraŭ la plej okulfrapa problemo en la nuna mondo, tial ĉesigo de armad-konkurado kaj defendo de la mondpaco fariĝis pli kaj pli forta alvoko de la tutmondaj popoloj.

Nun la ĉina popolo strebas por modernigisian landon. Por atingi tiun celon, ni sincere deziras havi internacian medion de longdaŭra paco. Ni volonte klopodos kune kun la popoloj de la tuta mondo por nuligi militan minacon kaj defendi la mondpacon. La prosperiĝanta Ĉinio kun miliardo da loĝantoj estas sendube potenca forto por garantii la pacon.

Oni povas diri, ke Esperanto estas nedisigebla de la paco. Nur en la kondiĉoj de paco, ĝi povas ekzisti kaj disvolviĝi. La verdstela standardo de Esperanto ja simbolas pacon, kaj esperan-

tistoj el ĉiuj landoj estas tradicie pacamaj. La disvolviĝo de la Esperanto-movado kaj pligrandiĝo de la esperantista vicaro evidente favoras la pacan aferon.

Mi sentas grandan honoron kaj samtempe ankaŭ ĝojon, ke mi estas elektita kiel prezidanto de la Honora Komitato de la 71-a Universala Kongreso de Esperanto, ĉar mi profunde kredas, ke la okazigo de la Kongreso certe akcelos la disvastiĝon de Esperanto en la monda sfero kaj ankaŭ kontribuos al interkompreniĝo inter la popoloj de ĉiuj landoj kaj defendo de la mondpaco.

En la nomo de la Honora Komitato, mi kore salutas ĉiujn partoprenantojn de la 71-a Universala Kongreso de Esperanto venantajn el diversaj landoj kaj deziras al la Kongreso plenan sukceson!

** La teksto estas salutvortoj por la Dua Bulteno faritaj de Huang Hua, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Ĉina Tutlanda Popola Kongreso kaj prezidanto de la Honora Komitato de la 71-a UK.*

ŬEJ LJAŬ:

Elkoran sonon al la 71-a UK

MA ĜINŜING, VERKISTO DE KANTOJ

Mi konis Ma Ĝinŝing, verkiston de kantoj, en lia simpla kaj bonorda akceptejo, kaj petis, ke li verku kanton por la 71-a UK. Kompreneble, mi priparolis al li la celon kaj signifon de la Esp-movado.

Li serioze aŭskultis mian parolon, liaj okuloj briletis je ekscitiĝo kaj entuziasmo. La seĝo kraketis sub lia korpo.

Antaŭ mia foriro, li promesis, ke li kiel eble plej rapide donos al mi sian tekston de la kanto.

Je la sekvinta tago, nelonge post komenco de la laborhoroj, mi notis en lia telefonado la de li verkitan unuan kanton por la 71-a UK "Verda, ho vi, Stel'", ĝi estas serena kaj lirikeca.

Posttagmeze de la sama tago, mi refoje faris telefonadon kun li. Li esprimis, ke li volas verki alian kantotekston por la 71-a UK.

Post nur unu vespero, ankaŭ el telefonado mi notis lian duan kantotekston "Ĝoja Kunven' ĉe l' Granda Mur'", ĝi estas pli profunda, bela, subtila kaj imagoriĉa.

Poste, mi informiĝis, ke post mia foriro, li falis en meditadon. Vespere, bruliginte cigaredon, li kuŝiĝis sur sofion. "Antaŭ mi estis mallumo," tiel li priskribis sian verkadon, "en nigra mallu-



Ma Ĝinŝing

mo, mi kvazaŭ falis en profundan putofundon. Subite, hela stelo brilis antaŭ miaj okuloj." Tiu ĉi fulme aperinta "stelo" ne nur inspiris lin verki la unuan kantotekston, sed ankaŭ konturis la duan en lia cerbo.

Matene, li trovis truon sur sia drapa pantalono, bruligitan de cigaredo.

Ma Ĝinŝing diris al mi, ke paco, amikeco kaj espero — la celo de la Esp-movado — estas forte prikantinda kaj povas instigi lin forte deziri verkadon.

Ma Ĝinŝing estas talenta kaj diligenta, en sia aĝo de 12 jaroj li jam publikigis siajn poemojn. Li estas 40-jara, sed jam verkis 800-900 kantotekstojn. Krome, li verkas ankaŭ eposojn, modernajn dramojn, ĉjuji-ojn (inkluzi-

ve de diversformaj rakontoj, humurdialogoj k.a.), operoj, prozoj. . .

Ma Ĝinŝing estas fama kantoteksta verkisto kaj eble ne fremda por niaj kantemaj legantoj. La teksto de la kanto "Tintsonoras Fonto" publikigita en nia gazeto, n-ro 5, 1980, estas de li verkita.

ERUDICIULO LJU JŬAN

Mi konatiĝis kun fama komponisto Lju JŬan en lia kabineto, ne vasta, sed plena de libroj.

Li estas membro de la Pekina Esperanto-Asocio. Ricevinte la tekston "Verda, ho vi, Stel'", li ekhavis devon. Li estis tre okupata, ĉiu minuto por li estis tre



Lju Jūan

valora. Ĉifoje li laboris preskaŭ tutan nokton kaj adaptis al la kantoteksto serenajn muzikaĵojn.

Lju Jūan estas jam 56-jara, sed ĉiam okupata pri komponado. En la lasta jaro, li plenumis unu muzikaĵon meznombro po tri tagoj. Krome, li adaptis muzikaĵojn al dekoj da filmoj kaj televidaj filmoj kaj verkis teorian libron "Pri la Nacia Muziko".

Lju Jūan estas ne nur komponisto, sed ankaŭ talenta en literatura verkado. La de li kompilita filmo "Tintsonoras Fonto" pri nacia muziko estas projekciata nun en Ĉinio.

Li estas komponisto kun neelĉerpebla talento kaj ekde la 50-aj jaroj preskaŭ ĉiujare premiitaj estas liaj kantoj. Lia "Kanto pri Karamai" komponita en 1958 estas ofte kantata de vastaj amasoj. Ankaŭ la bela kortuŝa melodio de la kanto "Tintsonoras Fonto" estas de li komponita.

Nun, Lju Jūan planas komponi pli da Esperantaj kantoj, por

prikanti amikecon, pacon kaj esperon.

SERIOZA LIŬ ŜIGAŬ

En la kabineto de Lju Jūan mi unuafoje vidis alian komponiston Liŭ Ŝigaŭ. Li estas ne parolema, tamen ŝatas esprimi siajn pensojn per kantoj. Kun vibranta kaj sentoplena voĉo li kantis por ni la de li komponitan kanton "Ĝoja Kunven' ĉe l' Granda Mur'", el la muzikaĵo mi konis, ke lia sento estas profunda kaj subtila.

Li komponis kvar muzikaĵojn kun malsamaj stiloj kaj ripetade komparis ilin kun Ma Ĝinŝing kaj aliaj kaj fine decidis preni la nunan muzikaĵon.

En muziko Liŭ Ŝigaŭ strebas al modesta kaj sincera beleco. Li estas por nacia stilo, surbaze de asimilado de diversskolaj artoj.

Tiu komponisto, kiu antaŭe okupiĝis pri ludado de violono kaj fluto, estas tre serioza en verkado. Kvankam li jam kom-


ponis centojn da muzikaĵoj, tamen neniu el ili lin kontentigis. Tio montras penadon de Liŭ Ŝigaŭ en arto.

La kantoj komponitaj de Liŭ Ŝigaŭ havas vastan influon en Ĉinio, ekz. "Nokto en Milithaveno", "Ho, Marvento!", "Panjo, Mi Revenas de Malproksima Navigado!" ktp. cirkulantaj en la amasoj.

Estas la harmonia kunlaboro inter Ma Ĝinŝing, Lju Jūan kaj Liŭ Ŝigaŭ. Por la 71-a UK ili ĉifoje faris duon-monatan benefikan kunlaboron.

Ni deziras, ke ilia arto kune kun la brilanta verda stelo prosperu en la tuta mondo.

Liŭ Ŝigaŭ



Verda, ho vi, stel'

VORTOJ DE MA ĜINŜING


TRADUKITA DE LAŬLUM

MUZIKO DE LJU JŬAN

Moderato, emocie



1. Vi el ok-ci-dent', mi el o-ri-ent', ni ja es tas fra-toj de l'
2. Vi de transla mar', mi de transmon-tar', ni al-ve-nas be-lan Bei-



Ah

ah



sa-ma gent'. Per ver-da stel' in-si-gno de esper'
jing de mil-jar'. Pro kar-me-mor' je re-vi-da hor'



De l'sa-ma gent'.

Ah

ah

in-ter-kom-pre-nas ni kun kor-sin-cer'.
pri'l'Granda Mur' vi-glos ni-a pa-rol'.

la la la la

Ver-da, ho vi, stel', in-si-gno de am' kaj es-per'.

Ver-da, ho vi, stel', sim-bo-lo de pac' kaj pros-per'.

sim-bo-lo de pac' kaj pros-per'.

Ĝoja Kunven' ĉe l' Granda Mur'

(MEZOSOPRANO)

VORTOJ DE MA ĜINŜING

TRADUKITA DE LAŬLUM

MUZIKO DE LIŬ ŜIGAŬ


Mod. dol.



1. Spi— te al bar' de mont' kaj mar',
(2. Bei— jing,) so- mer', kvi- e- ta ves- per'.
(3. Se nin) de- man- dos i- am in- fan':




jen ni al- ve- nas kun a- mi- kec- flor'.
Bri- las pa- la- co kaj tur' de glori'.
"Per kio be- li- ĝos pli ni- a mond'?"



En so- li- dar', ho, ver- da ste- lar'
Ĉas- ta la lun' tra nub' sur ĉi- el'
"Ĉi- am sin- ce- ra fra- te- ĉo- am'."



jen ra- di- as ki- el aŭ- ror'.
jen min ki- sas kun pu- dor'.
jen ni- a pre- ta res- pond'.



Ho, ĝo- ja kun- ve no
Ho, mil- da lun- lu- mo
Ho, ĝo- ja kun- ve no




êl' Gran- da Mur', ho, re- me- mo- rin- da
 êl' Gran- da Mur', ho, ne- for- ge- se- bla
 êl' Gran- da Mur', ho, tem- po ple- na de ple-




hor'. Ô- ja kun- ve- no êl' Gran- da
 hor'. Mil- da lun- lu- mo êl' Gran- da
 zur'. Ô- ja kun- ve- no êl' Gran- da




Mur', ho, re- me- mo- rin- da hor'.
 Mur', ho, ne- for- ge- se- bla hor'.
 Mur', ho, tem- po ple- na de ple-



2. Bei- jing, zur', ho, tem-
 3. Se nin



po ple- na de



ple- zur'.

Kien iros la reformado de la ĉina ekonomia sistemo?

De la fino de la 70-aj jaroj Ĉinio reformas sian ekonomian sistemon unue en la kamparo kaj poste en la urboj, kio vekis ĝeneralan atenton de la mondo. Nemalmultaj el niaj legantoj skribis al ni por montri sian grandan intereson pri perspektivo de nia reformado. Pro tio ni petis ekonomikiston Jang Ĉjiŝjan verki jenan artikolon.

La Red.


AVANTAĜOJ KAJ MANKOJ DE LA MALNOVA EKONOMIA SISTEMO

Ekonomia sistemo estas sistemo por organizi kaj mastrumi la ŝtatan ekonomion kaj grava konsistiga parto de produktaj rilatoj kaj superstrukturo. Kun malsamaj soci-sistemoj, produktaj fortoj kaj konkretaj ŝtataj kondiĉoj, landoj ne povas havi tute saman ekonomian sistemon.

La malnova ekonomia sistemo de Ĉinio estas

tiu de centralizita kaj planizita ekonomio ĝenerale praktikata de la socialismaj landoj. Tia sistemo estas utila al plenumo de la ĉefa konstrua tasko de la ŝtato, al realigo de ĝia difinita strategia celo, al rapida ŝanĝo de la malracia ekonomia strukturo kaj la malekvilibra regiona dispozicio kaj kontentigo de la minimuma vivbezono de la tutlanda loĝantaro en okazo de malsufiĉeco de produktaj. Ĝi ludis gravan rolon, por ke la ĉina

La nova kontenerizita doko de Dongdu en Ŝjamen



popolo establu, post la fondiĝo de la nova Ĉinio, siajn sendependajn kaj relative kompletajn sistemojn de industrio kaj nacia ekonomio kaj malaperigu certgrade siajn malriĉecon kaj postĝin-tecon.

Sed praktiko pruvis, ke tia sistemo havas ankaŭ grandajn mankojn. La ĉefaj estas jene: la ekonomia decida povo estas tro centralizita en la ŝtataj administraj institucioj ĉe diversaj niveloj, nedistingo de la respondecoj administrada kaj entreprenada, kaj manko de necesa aŭtonomeco en la entreprenoj kaj bazaj ekonomiaj unuoj; unuflankeca strebado al unueca publika posedsistemo kaj ekskluzivo de la ekzisto de pluraj formoj de ekonomio kaj pluraj metodoj de entreprenado; vertikala ekonomia administrado ĉefe laŭ departementoj kaj regionoj kaj rompo de horizontala rilato necesa por la ekonomia aktivado; reguligo nur laŭ direktiva plano kaj neglekto de leĝo de valoro kaj meĥanismo de merkato; troigo de apogo sur propraj fortoj kaj starigo de propra sistemo, malhelpo de racia interŝanĝo de ekonomio kaj tekniko kaj blinda disvolviĝo de konstruado de grandaj kaj malgrandaj ĉioampleksaj entreprenoj; praktikado de egalismo, unueca spezado en distribuado, kio vundis la progreseman spiriton de entreprenoj kaj iliaj laborantoj. Resume, la ŝtato ĉion monopoligis, kio malutilis al mobilizo kaj disvolvo de la diversflanka aktiveco, al la socia ekonomia efiko kaj al bona cirkulado de ekonomia disvolviĝo. La malutiloj speguliĝas ĉefe en la ekonomia konstruado. La elspezo estas granda dum la enspezo ne kontentiga. La produktado kreskis ŝajne rapide, sed perdo kaj malŝparo estis seriozaj, nove produktitaj riĉaĵoj kreskis ne rapide kaj la popolo profitis malfrue. Ekzemple, inter 1953 kaj 1980 la totala produktovaloru de la fiksa aktivo de Ĉinio kreskis 21-oble kaj la totala socia produktovaloru 7.5-oble, dum la nova socia riĉaĵo, t.e. la nacia enspezo, plimultiĝis nur 4-oble kaj la enspezo de la ĉina loĝantaro nur duobliĝis. La supra sistemo fakte estas senviva modelo, kiu ne akordas kun la postulo de la disvolviĝo de la sociaj produktaj fortoj kaj devas esti racie reformita.

STARIGI EKONOMIAN SISTEMON KUN ĈINAJ TRAJTOJ

La reformado de la ekonomia sistemo nun farata en Ĉinio celas forigi ĉiajn mankojn en la ekonomia sistemo, kiuj katenas la disvolviĝon de produktaj fortoj, kaj fari modelon de planizita komerca ekonomio kun ĉinaj trajtoj, plenan de viv-

energio. La ĉefa enhavo de la reformado estas jene:

1. Pliigi la administran aŭtonomecon de la entreprenoj kaj distingi administradon kaj entreprenadon, por ke entreprenoj fariĝu komercaĵa produktanto kaj mastrumanto, kiu estas vere relative sendependa kaj rajtas mem mastrumi siajn aferojn kaj mem prirespondi siajn profitojn kaj perdojn. Tio estas la baza elirpunkto kaj ŝlosila rimedo de la reformado.

2. Starigi strukturon de kuna disvolviĝo de pluraj ekonomiaj formoj kaj pluraj mastrumaj metodoj sub la premiso de superega pozicio de publika posedsistemo por plene mobilizi la aktivecon de ĉiuj flankoj.

3. Energie disvolvi socialismajn planizitajn merkatojn de komercaĵo, kapitalo, teknologio kaj laborkontrakto kaj iom post iom establi perfektan merkatan sistemon. Ŝanĝi la ekonomian sistemon, kiu reguligas ekonomion ĉefe per direktiva plano kaj administra rimedo, en sistemon, kiu servas al la ŝtato per pluraj efikaj reguligaj rimedoj, ĉefe per tiu de ekonomia reguligo.

4. Ŝanĝi la ŝtatan ekonomian administradon ĉefe rektan iom post iom en tiun ĉefe nerektan. Ŝanĝi la taskojn de ekonomia administrado de diversnivelaĵoj ŝtataj institucioj difini kvotojn, doni sankcion al laborkontraktoj kaj distribui materialojn kaj instalaĵojn en tiujn de planado, kunordigado, servo kaj superrigardo.

5. Ŝanĝi la sistemon fermi la pardonon al la aliaj landoj kaj apartigi kaj bloki unu alian enlande en pordmalferman politikon internan kaj eksteran kaj en sistemon plene utiligi sian superecon, ekspluati alies fortaĵojn por ŝtopi siajn mankojn kaj aktive disvolvi la ekonomian kaj teknikan interŝanĝon kun aliaj landoj kaj la horizontalan ekonomian kontakton inter diversaj regionoj kaj departementoj.

6. Ŝanĝi la metodon de egalisma distribuado kaj unueca spezado en tiun de laŭklasa distribuado, pago laŭ laboro, kombino de devo, rajtoj kaj interesoj, premiado al la elstaraj kontribuantoj kaj puno al la maldiligentaj laborantoj kaj malzorgantoj de sia devo.

Resume, estas necese konservi la proprajn karakterizaĵojn kaj fortaĵojn de la socialisma planizita ekonomio, lerni kaj akcepti la por ni utiligeblajn efikajn metodojn de evoluantaj landoj en organizado kaj mastrumado de la merkata ekono-



Memservejo funkciigata de kamparanoj en la okcidenta antaŭurbo de Pekino

mio. Nur bona kombino de planizita ekonomio kaj merkata reguligo povas pli bone akceli la disvolviĝon de la sociaj produktaj fortoj, iom post iom proksimigi nian ekonomion al la nivelo de evoluintaj landoj, kaj kiel eble plej baldaŭ kuratingi kaj superi tiujn landojn.

REFORMADO UTILA AL FIRMIGO DE LA SOCIALISMA SISTEMO

La tasko por reformi la ĉinan ekonomian sistemon estas, sub la premiso teni la fundamentajn socialismajn principojn, ŝanĝi serion da interrilatoj en la produktaj rilatoj kaj superstrukturo nekonforman al la disvolviĝo de produktaj fortoj. Tio estas memtransformado kaj memperfektigado de la socialisma sistemo farataj laŭplane, laŭpaŝe kaj laŭvice sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la popola registaro. La reformado utilas al stabiligo de la socio, disvolviĝo de la produktado, plibonigo de la popola vivo, potencigo de la ŝtata financo kaj solidigo de la socialisma sistemo, sed neniam kondukos al la kapitalisma vojo, ĉar la reformado celas starigi

la novan socialisman ekonomian sistemon kun ĉinaj karakterizaĵoj, kvankam la konkretaj rimedoj por regi kaj reguligi ekonomion havas eble kelkan similecon kun tiuj de evoluintaj landoj por adaptiĝi al la bezono de la socia amasproduktado kaj la disvolviĝo de la komercaĵa ekonomio, tamen la jenaj ĉefaj principoj estas tute diferencaj de tiuj de la ekonomia sistemo de la kapitalismaj landoj.

1. Estas malsamaj la naturoj de ŝtataj reĝimoj. La socialisma reĝimo de Ĉinio reprezentas la interesojn de la plejparto de la popolo, sekve ĝia ekonomia decido povas kaj devas konsideri la interesojn de la tutlanda popolo.

2. Estas malsamaj la strukturoj de ekonomiaj posedsistemoj. La socialismo de Ĉinio, bazita sur la publika posedsistemo de produktaj rimedoj, povas kongruigi la ĝeneralajn interesojn de ĉiuj flankoj.

3. La planoj ludas malsamajn rolojn. La socialisma posedsistemo de Ĉinio ebligas al la ŝtato ellabori makrokosmajn ekonomiajn planojn

*Mikrokomputilo
uzata en Liŭgŭang-
vilaĝo, Henan-
provinco*



relative perfektajn kaj konformajn al la bezono de la tuto. Tiaj planoj, aprobite de certa leĝa procedo, havos grandan forton limigi la registarajn departementojn kaj ankaŭ ties normoj povas limigi la entreprenojn, kio povas puŝi ĉiujn flankojn alpreni pozitivajn kaj efikajn rimedojn por garantii kompletan aŭ preskaŭ kompletan efektivigon de la planoj.

4. Estas malsamaj la principoj de distribuado. En la socialisma ŝtato oni distribuas la sociajn riĉaĵojn ĉefe laŭ kontribuo de laboruloj.

5. Estas malsamaj la kriterioj de sociaj moraloj. La socialisma ekonomia aktivado devas pledi por kvalito de la varoj kaj honestaj prezoj kaj por bona virto de entreprenado kaj, pere de efika ŝtata reguligo, realigi la komunan riĉigon de la tuta popolo.

Estas grave kaj menciinde, ke Ĉinio estas suverena ŝtato, granda socialisma lando kun 9 600 000 kvadrataj kilometroj da tero, miliardo da loĝantoj kaj forta bazo de ekonomia disvolviĝo. Tio decidas, ke la ekonomia konstruado de Ĉinio dependas ĉefe de ĝia propra forto, sed ne provizoj de aliaj landoj. Praktiki la pordmalferman politikon kaj laŭeble utiligi eksterlandajn kapitalojn kaj avangardajn sciencojn kaj teknikojn povas ludi nur necesan, interkompletigan

rolon sub la kondiĉo de egaleco kaj reciproka utilo. En Ĉinio neniam okazos tia fenomeno, kia antaŭ ĝia Liberiĝo, ke ĝiaj gravaj ekonomiaj kampoj estis superregataj de aliaj landoj kaj estis bazo de krudmaterialoj kaj merkato de alilandaj produktaĵoj.

SENPRECEDENCE NOVA SITUACIO

La kelkjara praktiko pruvis, ke anstataŭ konduki al kapitalismo, la reformado de la ĉina ekonomia sistemo pli kaj pli perfektigas kaj firmigas la socialisman sistemon.

Kvankam Ĉinio certgrade vigligis siajn entreprenojn kaj ekonomion kaj donis pli da aŭtonomeco al la bazaj ekonomiaj organizoj, tamen la ekonomia aktivado de la entreprenoj kaj socio en la tuto estas ankoraŭ sub la gvido de la makrosma ekonomia plano de la ŝtato. En Ĉinio okazis nenia ekonomia krizo, nek serioza ekonomia misproporcio, kian kaŭzis iama praktikado de altgrada kaj centralizita laŭplana administrado. En la lastaj jaroj aperis daŭra, stabila kaj harmonia disvolviĝo de la ĉina ekonomio, malofte vidita eĉ post la fondiĝo de la popola respubliko.

Kvankam Ĉinio ekhavis plurajn formojn de ekonomio kaj plurajn metodojn de entreprenado kaj certgrade altigis la proporcion de nepublika

ekonomio, tamen ĝis la fino de 1985 la proporcio de la publika ekonomio (inkl. de la ŝtata kaj la kolektiva) konsistigis ankoraŭ proksimume 98% de la totala produktovaloro kaj tiu de la privata ekonomio kaj la ekonomio de eksterlandaj kapitaloj nur 2%. La proporcio de la antaŭa konsistigis ankoraŭ pli ol 80% de la totala valoro de po-detala vendo kaj tiu de la lastaj malpli ol 20%. Tio montras, ke la reformado ne ŝanĝis la absolute superan pozicion de la socialisma publika ekonomio.

Kvankam Ĉinio ekpraktikis la pordmalferman politikon, depruntis eksterlandajn kapitalojn kaj enkondukis avangardajn teknikojn, tamen en la fino de 1985 Ĉinio ŝuldis al aliaj landoj nur 6 miliardojn da usonaj dolaroj, kies proporcio en la elspezoj por la ĉina ekonomia konstruado estas malgrandega. Tio ne influis la ekonomian sendependecon, nek deviis la principon sin apogi ĉefe sur la propraj fortoj.

Kvankam konsiderinde multiĝis la pokapa enspezo de la ĉinoj kaj alte leviĝis ilia vivnivelo, tamen ne okazis polarizo, ke pli riĉiĝis la riĉuloj kaj pli malriĉiĝis la malriĉuloj. Ĉinio kompare bone praktikas la principon "al ĉiu laŭ lia laboro" kaj efektivas komunan riĉigon. Kalkulate laŭ konstanta prezo, la pokapa enspezo de la ĉinoj en 1985 preskaŭ duobliĝis kompare kun tiu en 1978, dum tiu de la kamparaj loĝantoj kreskis pli-ol-du-oble kaj tiu de la urbaj loĝantoj je pli ol 70%. Tio ne nur rimarkinde malgrandigis la

diferencon inter la vivniveloj de la kamparaj kaj urbaj loĝantoj, sed ankaŭ reduktis la nombron de la malriĉaj familioj en la kamparo de pli ol 30% al malpli ol 10%.

Antaŭ la reformado la ĉina ekonomio kreskis malrapide kun efiko malalta kaj misproporcio evidenta, la teknologio progresis malrapide kaj la popola vivo boniĝis ankaŭ malrapide. Dank' al la reformado en la 80-aj jaroj ne nur la kreskado de la ĉina ekonomio multe transpasis la taksitan rapidecon, sed ankaŭ la akumulo kaj konsumo, la agrikulturo kaj industrio, kaj la peza kaj malpeza industrioj harmonie disvolviĝis, la totala socia produktovaloro, la totala nacia produktovaloro kaj la konsumo de la popola vivo preskaŭ samtempe kreskis, kaj la socia ekonomia efiko kaj la scienc-teknika nivelo rimarkinde leviĝis. Sekve de tio en Ĉinio aperis senprecedence prospera politika kaj ekonomia situacio.

Ĉinio daŭre senŝanceliĝe kaj serioze faros ĉiuflikan, profundan kaj kompletan reformadon en difinita direkto de reformado kaj, post kvin jaroj aŭ pli longa tempo, starigos sur la vasta tero de Ĉinio novan socialisman ekonomian sistemon kun ĉinaj karakterizaĵoj, plenan de vivenergio.

** La aŭtoro estas ekonomikisto kaj laboras kiel membro de la Ĉina Komisiono por Reformado de Ekonomia Sistemo kaj estro de ĝia grupo pri ĝenerala planado.*

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: 1 internacia respondkupon por 5 vortoj aŭ mallongigoj. **Por fotoj:** 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* Ŝieh Ning (20-jara studento), P.O. Box 83006, Beijing University, Beijing, Ĉinio, volas korespondi kun esp-istoj en angle-, france- kaj germane-parolantaj landoj.

* Dez. kor. kun fakuloj pri metalurgio. Skribu al: s-ro Wang Tianyi, Shaanxi Gangchang, Xi'an, Ĉinio.

* Wang Lin (26-jara raportistino), Liuzhi Tequ Xuanchuan Bu, Guizhong, Ĉinio, vol. kor. kun s-anoj (26-40j.) en angle-parolan-

taj landoj, pri tradukado de literaturaĵoj kaj pied-vojaĝo.

* Mi dez. kor. tutm. pri ĉ.t., kaj interŝ. b.k., p.k., kaj librojn. Adreso: Lin Junlong (26-jara), Gui Guo Huaqiao Lianhehui, Dunhua Shi, Jilin-provinco, Ĉinio.

* Ni Yundong (24-jara instruisto), 65008 Qujing Shi San Zhong, Liaohu, Qujing, Yunnan-provinco, Ĉinio, dez. kor. tutmonde, speciale kun esp-istoj en USSR kaj orienteŭropaj landoj.

TIE ĈI PAROLAS BYISK...*

“CQ, CQ, tie ĉi parolas BYISK...”

La unuan de junio, 1985, je la deka la Amatora Radiostacio en la Geknaba Scienc-teknika Domo de Ŝjūan’u-distrikto en Pekino dissendis festan gratulon al la ĉinaj kaj eksterlandaj geknaboj. Multaj radio-amatoraj stacioj en- kaj eksterlandaj tuj ricevis la vok-signon de tiu novfondita radiostacio kaj respondis per varma saluto. “Tie ĉi parolas la Ĉengdu-a Geknaba Amatora Radiostacio. Ni deziras al vi ĝojan feston. . .”, “Ĉi tie parolas nia usona amatora radiostacio, mi deziras ke ni fariĝu amikoj en aero. . .”, “Tie ĉi parolas nia japana radio-amatora stacio, ni tre ĝojas ke ni povas interparoli kun vi. . .” Starigis komuniĝon kun ĝi ankoraŭ pli ol

50 amatoraj radiostacioj de dekkelkaj landoj kaj regionoj, kiaj Jugoslavio, Kanado, USSR, Britio kaj Svisio. Amikecaj elektronadoj proksimigis iliajn korojn.

La geknaba radio-amatora stacio antaŭe estis la Geknaba Telegrafi-amatora Grupo de Ŝjūan’u-distrikto, kiu elkulturis junajn radio-amatorojn aron post aro en la lastaj jaroj. Ĝi estis laŭdita kiel “lulilo de telegrafaj radio-amatoroj”. Gong Kelu, unu el la unuaj grupanoj trejnataj en la grupo, gajnis la ĉampioncon de geknaba kategorio en la Ĉina Radio-telegrafa Konkurso de 1979. Nun li estas direkta instruisto de tiu ĉi stacio. Li diris al mi: “En la lastaj jaroj amatoraj radio-stacioj disvolviĝis rapide dank’ al la zorgo kaj subteno de la socio. Mi kredas, ke

nia stacio povos elkulturi pliajn ĉampionojn de la tutlandaj konkursoj.”

Nun la stacio havas 40 membrojn, kiuj estas la duaj kursanoj post ĝia fondiĝo. Ili estas volontuloj por tiu aktivado, plejparte venintaj el la mezgradaj kaj elementaj lernejoj en tiu ĉi distrikto. Ili aktivadas dufoje en semajno post lernhoroj kaj kvinfoje semajne en someraj kaj vintraj ferioj. Ĉi tie ili lernas fremdan lingvon kaj tajpadon, parkere legas kodon kaj sin ekzercas pri telegrafado. Tiuj geknaboj tre amas tiun aktivadon. Ding Ŭej, Liu Lihong kaj Ĝaŭ Limej estas samlernejanoj kaj aktivuloj de radio-komunikado. Ding Ŭej estas vigla kaj ŝercema, sed serioza en la trejnado. Somere, en sufoka kaj varma ĉambro li persiste sin ekzercis en manipulado. Liŭ Lihong kaj Ĝaŭ Limej estas hontemaj knabinoj. Ili sidis unu apud la alia ĉe la sama tablo dum trejnado, kuraĝigante sin reciproke kaj konkursante en deĉifrado de koditaj tekstoj. Ĝaŭ Limej estas la plej eminenta lernanto en sia lernejo. En la klaso ŝi ĉiam gajnis la unuan lokon en ekzamenoj. Krom regula ĉeesto al la trejnado ŝi ekzercis sin ankaŭ hejme. “Mi nomiĝas Ĝaŭ Limej, 14-jara. Saluton! Mi tre ĝojas ke mi povas paroli kun vi. . .” ŝi buŝe sin ekzercis angle.

Ĉi tie lernas ankaŭ speciala kursano Ĉen Sidong. La kursanoj nomas lin “instruisteto”. Li aĝas 18 jarojn kaj estas lernanto de la kvina klaso de la Pekina 78-a Mezlernejo. Komence li lernis telegrafadon nur pro scivolemo, sed poste li ĝin amis iom


En komuniĝo kun fremdlandaj amikoj



post iom. . Antaŭe li ne interesiĝis pri la lecionoj de la angla lingvo kaj ofte ne sukcesis trapasi ekzamenojn. Partopreninte en la telegrafa grupo, li ekkomprenis, ke por posedi la teknikon oni devas bone koni la anglan lingvon. De tiam li lernis la lingvon diligente. Post unu jaro li multe progresis kaj gajnis ne malpli ol 90 poentojn en ĉiu ekzameno de la angla lingvo. Nun krom trejni sin en la grupo, li ankaŭ helpas instruiston Gong lernigi pli junajn kursanojn.

Ĉen Sidong diris: "Mi tre amas nian radiostacion. Mi preskaŭ forgesis paroli pro troa streĉiĝo, kiam mi unuafoje parolis kun fremdlanda amato pere de radiostacio. Nun mi jam alkitimiĝis. Je la komenciĝo de la novjara tago apenaŭ ekbatis la dudek-kvara horo, diverslandaj amatoraj stacioj jam vokis, 'Ĉinio, Ĉinio', kaj gratulis nin konkure. La komunikado daŭris ĝis la deka de la sekva tago. Fremdlandanoj konintaj la ĉinan lingvon volis kapti tiun ŝancon paroli kun ĉino. Ankaŭ ĉinaj studentoj lernantaj eksterlande volis saluti siajn familianojn pere de la radiostacio. . ." Fine li kun emocio diris: "Multaj geknaboj amas amatoran radiostacion, sed bedaŭrinde Ĉinio havas tro malmultajn amatorajn staciojn, precipe la geknabajn. Ni esperas, ke aperos pli multaj geknabaj stacioj."

Pro kio la radio-amatora aktivado tiel forte allogas al si geknabojn? Hŭang Maŭĝuang, estro de la Geknaba Scienc-teknika Domo de Ŝĵuan'u-distrikto, unu el la fondintoj de la amatora radio-stacio, diris: "La knaboj vivas en la epoko, en kiu la radio-tekniko estas sufiĉe disvolviĝinta, tial nemalmultaj inter ili ekinteresiĝis pri diversaj radio-



Telegrafa ekzercado

amatoraj aktivadoj en sia infaneco. Tiuj aktivadoj instigas ilin malkovri naturajn enigmojn, vastigi ilian vidkampon, riĉigi iliajn sciojn kaj altigi ilian kapablon."

Iutempe iuj kursanoj enuis de ripetada ekzercado kaj eĉ ne volis plu lerni. Tian psikan staton kiel elektrajn ondojn tuj kaptis ilia instruisto. Li ne kritikis ilin, sed rakontis al ili veran historion okazintan en la urbo Tangŝan, 1976. Kiam okazis tertremo, iu telegrafisto grave vundiĝis, sed li persistis en sia laboro, rapide kaj ekzakte telegrafis al Pekino la posttertrematan staton de Tangŝan, tenante la radioaparaton en sia sino. La instruisto demandis, per kio li plenumis la taskon? Kursano Ĵen Ĵuanhuj diris, kion aliaj kursanoj volis diri: "Tio estas forta respondec, obstina volo kaj majstra tekniko." Aŭdinte la rakonton la kursanoj pli profunde komprenis la gravecon de radio-komunikado. Ekde tiam ili lernis pli diligente. Por vekti intereson de la geknaboj Gong Kelu aranĝis por ili praktikan manipuladon, ekz. asigni al ili komunikan taskon dum sporta kunveno aŭ somera tendumado. Ili ricevis laŭdojn

de diversaj socitavoloj pro sia elstara plenumado de ĉiuj taskoj.

Ekde preparado por la fondo de la geknaba amatora radiostacio estas ĉiam zorgata kaj flegata de diversaj socitavoloj. La Ĉina Radio-sporta Asocio, la Pekina Scienco-populariga Asocio kaj la Geknaba Scienc-teknika Domo de Ŝĵuan'u-distrikto ĉiamaniere helpas la stacion. En la fino de la lasta jaro nombro da radiaj specialistoj kaj veteranoj estis invititaj kiel postlaboraj instruistoj de la stacio.

Specialistoj montris, ke la radio-amatora aktivado de geknaboj komenciĝis malfrue en Ĉinio. Nun la geknabaj scienc-teknikaj organizoj en diversaj lokoj stariĝis multe da radio-amatoraj grupoj, sed nur naŭ amatorajn radiostaciojn. Estonte, kun la populariĝo de la amatoraj radiostacioj, kiel tiu de Ŝĵuan'u-distrikto de Pekino, iliaj amikeco kaj kunlaboro kun eksterlandaj radio-amatoroj fariĝos pli intimaj.

* Tiu ĉi artikolo estas en ĵacila lingvo.

Post ŝafbatalo

(Mikronovelo)

Tute malheliĝis, kiam li estis vekita de sia ronkado.

Li leviĝis kaj sentis kapturnon. Lia talio doloris pro ŝtonetoj sub la korpo. Restis al li malpli ol duonkruĉo da vino.

El la obskura arbedaro venis de tempo al tempo apenaŭ aŭdeblaj interparoloj de homoj kaj rompobruo de vergoj.

Knedante al si la talion, li direktis la rigardon al la stelplena ĉielo anstataŭ al la fonto de la sonoj. Li bone sciis, ke la junuloj, kiuj ĝojis dum la tuta tago, nun pasie ĉirkaŭprenas sian amatinon por verŝi al ŝi la koron. Ankaŭ li spertis tion — sed antaŭ dek jaroj.

Svingiĝis la branĉoj post li. Li retrorigardis kaj vidis ion vilan kaj blankan ŝoviĝanta antaŭ lian vizaĝon. Surprizite li tuj etendis manon por bari ĝin, kaj lia mano tuŝis malgrasan longan vizaĝon.

Estis lia ŝafo.

Ĝi ankoraŭ restis? Li miris. Ĉu ĝi ne forkuris?

En la posttagmeza ŝafbatalo ĝi estis venkita de nigra ŝafo de la najbara vilaĝo. Ĝi eĉ ne gajnis la okan lokon! Eĉ la makulhara ŝafo de samvilaĝano Jang Laŭŝan, kiu ofte estis venkita de ĝi, gajnis la trian lokon! Pro ofendiĝo kaj kolero li trenis la ŝafon en arbedaron sur la montodeklivo, derompis vergon kaj senkomplete vipis la ŝafon. La ŝafo derompis la ŝnuron kaj forkuris kun dolora beado...

Anstataŭ persekuti ĝin, li sidigis kaj ekdrinkis. Ŝafo havas dikan tavolon da haroj, sed li ne.

Li balancis la kapon kaj ne povis kompreni, kial duonkruĉo da maiz-vino tiel ebriigis lin. Oni ne estas brava, se oni drinkas pro ofendiĝo.

Blovo da monta vento preterglitis kaj iom refreŝigis lin.

“Venu!” Li vokis la ŝafon kaj ĝi tuj ŝovis sian malgrasan kaj malmolan kapon en lian sinon, kvazaŭ ĝi longe atendus lian vokon.

Kaptinte ĝiajn dikajn kaj kur-bajn kornojn, li iom depuŝis la ŝafon kaj fiksis la rigardon sur ĝia malgrasa vizaĝo simila al renversita triangulo.

Ĉe la stellumo la okuloj de la ŝafo flagris same kiel steloj. La kornoj de la ŝafo sentigis al li varmeton, kaj ĝiaj elspiroj estis pli varmaj. Fikse rigardante la ŝafon, li eksentis varmon en la brusto, kvazaŭ li englutus plumbuŝon da akra brando. Ĉiuj foriris! La maljunuloj kaj la infanoj revenis hejmen kaj nun estis ĝuantaj belan songon, kaj la junuloj kaj junulinoj kaŝiĝis en la arbedaro kaj restigos la songon tie. Nur ĝi, la blanka ŝafo, restis por atendi lin ĝis lia vekigo!

Li palpis la frunton de la ŝafo kaj ĝian vundon kaŭzitan de la taga batalo. Koaguliĝis la sango ĉe la vundo, tamen la ŝafo ekstremis de la doloro pro lia palpado. Lia mano tuŝis ĝiajn malgrasajn vangojn kaj sentis malsekecon. Tio ne estis roso, ĉar ne estis tempo rosi. Li komprenis, ke ankaŭ la ŝafo afliktiĝis kaj larmis.

Subite li sentis malagrablan ploremon en la nazo kaj ekbedaŭris: Kio grava, ke ĝi perdis la

batalon? Nur pecon da ruĝa silko kaj kruĉon da sorgo-vino por venkinto! Estas interese, ke ĉiu homo estas konkurema. Efektive eĉ la plej forta viro ne povas ĉiufoje venki en batalo, por ne paroli pri ŝafo. . .

“Ve, mi ne devis bati vin!” li murmuris al la ŝafo. “Vi ne povas venki la nigran ŝafon. Tiu bastardo estas dekelkajn kilogramojn pli peza ol vi!”

La ŝafo diris nenion. Ĝi nur lekis lian mankavon per la varma kaj malseka lango. Ŝafoj ŝatas salon, kaj la ŝvito sur la mano estas sala.

Ekventis. Li ekstremis de malvarmo kaj stariĝis ŝanceliĝe. Li frotis la lekitan manon sur ĝiaj densaj kolharoj. Post tio li prenis la kruĉon kaj trinkis vinon per unu tiro.

La lastajn gutojn da vino li verŝis en sian mankavon kaj etendis la manon ĉe la buŝon de la ŝafo.

La ŝafo ne trinkis la vinon, sed laŭte ternis ĉe lia mankavo.

Li ekridis, frapetis ĝian vangon kaj diris: “Bastardo, ni iru hejmen!”

Li iris kun lacaj kruroj. La ŝafo sekvis lin.


La arbofolioj susuris en nokta vento.

La steloj brile flagris. Estis kviete sur la monto.

Malproksime leviĝis kanto de ebrulo. . .

(Esperantigis Ŭang Ŝijong)

* La aŭtoro estas huj-o en Junnan-provinco.



ORĀ INFANECO

Malgranda luktisto
Foto de MA ĈENG



*"Mi estas malgranda
ĉevalo."*


Foto de ŜJE ŬANG



"Ĝi estas mia kunulo."
Foto de **ŜJE ŬANG**

Infanludo "Veturanta Vagonaro"

Foto de **JU ĜISIN**



*"Mi gardas la melon-ĝardenon
por mia avo."*


Foto de **JU ĜISIN**






"Mi fariĝis neĝhomo!" Foto de JU ĜISIN

Pentrado laŭ imago Foto de SIN HŪA





La industria subdistrikto Longhu en Ŝantoŭ



En ceramikaĵa fabriko

Ŝantoŭ—hejmloko de elmigrintaj ĉinoj kaj speciala ekonomia distrikto

de GE ŜI



En la haveno

La Ŝantoŭ-a Speciala Ekonomia Distrikto situas oriente de Ŝenĝen je pli ol 200 km. La distrikto, oriente de la urbo Ŝantoŭ, estas tre proksima al la malnova parto de la urbo.

La urbo Ŝantoŭ estas havenurbo kun historio de pli ol 100 jaroj ĉe la sudorienta marbordo de Ĉinio. Ĝi havas longan historion de ekstera komerco. Tie estas bonaj naturaj kondiĉoj kaj sufiĉaj laborfortoj, kaj plie, la urbo estas kiel hejmloko de elmigrintaj ĉinoj. Inter la 30 milionoj da elmigrintaj ĉinoj 20% devenis de Ĉaŭĝoŭ kaj Ŝantoŭ. La industri-agrikultura bazo kaj la haveno prezentis favorajn kondiĉojn al fondo de speciala ekonomia distrikto.

La Ŝantoŭ-a Speciala Ekonomia Distrikto estas la plej malgranda el la 4 specialaj distriktoj de Ĉinio. Nun ĝi kovras 52.6 kvadratajn kilometrojn, inter kiuj


22.6 kvadrataj kilometroj apartenas al Longhu-subdistrikto kaj la ceteraj 30 kvadrataj kilometroj al Gŭang'aŭ-subdistrikto. Ĝi okupiĝas ĉefe pri produktaĵa prilaborado kaj eksportado.

Pro siaj apartaj medio kaj kondiĉoj ĝi diferencas de Ŝenĝen kaj Ĝuhaj en konstruado. La konstruado en la lastaj du estas rapida kaj grandskala, sed tiu en Ŝantoŭ estas stabila kaj paŝopostpaŝa. La Ŝantoŭ-a Speciala Ekonomia Distrikto komencis konstruadon kompare malfrue, t.e. marte de 1982. En la komenco ĝi havis multajn malfacilojn, kiaj trafiko maloportuna, energio nesufiĉa, telekomunikado postiginta kaj manko de kapitaloj. Tiam la ŝtato investis al la distrikto nur po 6.4 milionojn da jŭanoj (10 milionojn da jŭanoj en 1984) ĉiujare, kiuj eĉ ne sufiĉis por pavimi vojon al la urbo. La tieaj gvidantoj pensis, ke de prilaboro

de eksportaĵoj oni profitas ne multe, la investaĵoj devenas ĉefe de prunteprenoj, kaj eksterlandaj entreprenistoj ne multe investos antaŭ deradikala pliboniĝo de la investo-cirkonstancoj. Tial oni agis laŭ sia eblo kaj ne blinde ĉasis rapidecon nek skalon. Laŭ la principo "profito venu tuj post finkonstruo", ili faris konstruadon laŭ la ĝenerala plano kaj paŝo post paŝo. Antaŭ ĉio, ili faris konstruadon de fundamentaj ekipaĵoj en la prilabora subdistrikto Longhu, agrikultura subdistrikto Ĝuĉi kaj doka tereno. En la lastaj jaroj oni ekspluatis tie entute 0.78 kvadratan kilometron da tero por industria, komerca kaj havena konstruado kaj 1.5 kvadratajn kilometrojn por terkulturo kaj akvoproduktado. Nun ili pavimis larĝan ŝoseon de la speciala distrikto al la urbocentro. Surbaze de la bone aranĝitaj akva kaj elektra

Pli ol duono de la tapiŝoj produktitaj de la loko estas vendata eksterlande.

En vestofarejo





En fabriko de ludiloj

provizado, komunikado, transportado, navigacio, subteraj akvojoj kaj terebenigo, la surtera konstruareo ampleksis pli ol 300 000 kvadratajn metrojn, inter kiuj 170 000 kvadrataj metroj estis okupitaj de fabrikdomoj, iuj hoteloj, magazenoj, restoracioj, apartamentoj, oficistaj loĝdomoj, doko por 3 000-tonelaj kontener-ŝipoj kaj loz-kargaj ŝipoj kaj 110 000-volta-transformatora stacio, kaj samtempe iris konstruado de mikroonda komunikado, programrega telefonio kaj telekso kunlabore kun la

urba poŝta kaj telekomunika oficejo. En la pasintaj 4 jaroj la totala investo de la fundamenta konstruado atingis 130 milionojn da jŭanoj, kio kreis bonan kondiĉon por investado.

Malgraŭ, ke la speciala ekonomia distrikto ekflugis kompare malfrue, oni ellernis multajn utilajn spertojn de aliaj specialaj ekonomiaj distriktoj. En la ekonomia disvolviĝo ili persistis en la principo "preni en la investado ĉefe fremdan kapitalon kaj meti la atenton ĉefe sur industrion kaj vendi la produktaĵojn

ĉefe en aliaj landoj". Ili akiris certan sukceson en enkonduko de fremda kapitalo kaj tekniko, entreprena strukturo kaj gajno de fremdaj valutoj per eksportaĵoj. Fine de novembro, 1985 oni subskribis kontraktojn por enkonduko kaj memstarigo de 237 konstruobjektoj kun totala investo de 1 945.38 milionoj da hongkongaj dolaroj, inter kiuj estis 67 enkondukaj objektoj kun fremda investo de 619.35 milionoj da hongkongaj dolaroj. Inter ili estis 141 konstruobjektoj industriaj, agrikulturaj kaj trafikaj. La entreprenoj funkciigataj en la speciala ekonomia distrikto plejparte gajnis kompare bonan profiton. Iuj fremdlandaj entreprenistoj duobligis sian agadsferon. Ankaŭ la imposto kaj profito de la distrikto pliiĝis jaron post jaro. En la pasintaj 3 jaroj ili reprenis duonon de la investita sumo. Tio montris, ke per malgranda investado oni povas rapide akiri bonan efikon. Nun la entreprenoj vendas siajn varojn ĉefe en aliaj landoj. Estas eksportataj pli ol 60% de la industriaj produktaĵoj, kiaj tapiŝoj, vestoj, plastaj produktaĵoj, artaj ceramikaĵoj, ludiloj, mebloj, artefaritaj juveloj ktp.

Ŝantoŭ situas en la subtropika zono. Tie pluvo estas abunda kaj klimato agrabla. La tieaj kamparanoj lertas en agrokulturo. Ĝia marbordo longas je 389 kilometroj. La loko estas abunda je legomoj, fruktoj, akvoproduktaĵoj. Pro tio ĝi povas fariĝi distrikto kun moderna ĉina agrikulturo. La tieaj gvidantoj bone konas tion. Tial, samtempe kun industria disvolviĝo la distrikto fondis agrikulturan subdistrikton. Ili starigis agrikulturan kompanion kun oranĝ-ĝardeno, hortikulturejo, legom-kulturejo, kokbredejo, akvoproduktaĵa bre-

dejo kaj sovaĝbesta bredejo. Ili energie enkondukas fremdan kapitalon kaj avangardan agrokulturan teknikon, faras terkulturadon kaj akvoproduktaĵan bredadon kun siaj propraj trajtoj. La distrikto enkondukis 44 bonajn speciojn el aliaj landoj. La eksperimentado montris, ke inter ili dekelkaj havas certan valoron por disvastigo. Ili estas dolĉa maizo kaj blankaj kokoj de Usono, fruaj brasikoj de Tajlando, francaj kokoj k. a. Fremdlanda entreprenisto starigis fabrikan de miksa nutraĵo kun produkto-kvanto de 50 tunoj ĉiutage. 95% de ĝiaj krudaj materialoj devenas de la proksimaj lokoj. Lokaj kamparanoj bredas kortobirdojn kaj brutojn per ĝiaj produktaĵoj, kun bona efiko. La fabriko liveras ankaŭ bonrasajn kokidojn kaj kokbredan teknikon. Antaŭe

ĉiu homo zorgis nur 1 000 kokojn. Ellerninte la bredan teknikon kaj modifinte la trogetojn ĉiu bredanto zorgas 5 000 kokojn. La metodo povas ŝpari nutraĵon kaj fari la bredon pli pura. Estas vendataj en la internacia merkato 96% de iliaj kulturitaj Huĝoŭ-mandarinoj, papajoj, dolĉa maizo, dolĉaj kapsikoj, angiloj, salikokoj, kraboj, testudoj, serpentoj k. a. per kio ili akiris konsiderindan sumon da fremdaj valutoj. Nun la distrikto pretas plue enkonduki fremdan kapitalon, avangardajn teknikojn kaj bonspaciajn bestojn kaj plantojn por pluapase disvolvi akvoproduktaĵan bredon kaj brutobredadon, kulturadon de fruktaroj, legomoj kaj floroj, prilaboradon kaj pakadon de agrikulturaj produktaĵoj.

La grandnombraj elmigrintaj ĉinoj estas unu el la favoraj kondiĉoj de la distrikto. La Ŝantoŭ-a Speciala Ekonomia Distrikto donas grandan atenton al akcepto de la elmigrintaj ĉinoj, hongkongaj kaj tajŭan-aj samlandanoj, por ke ili subtenu la distrikton per investado. Ĝis nun preskaŭ ĉiuj entreprenoj fonditaj per fremda kapitalo estas investitaj de elmigrintaj ĉinoj aŭ ĉin-devenaj alilandanoj. La distrikto organizis konsilistan grupon el elmigrintaj ĉinoj, por ke ili prezentu siajn opiniojn pri la tiea konstruado.

Kun disvolvo de industrio kaj agrikulturo la Ŝantoŭ-a Speciala Ekonomia Distrikto entreprenas ankaŭ turismon, transportadon, komercon kaj kulturen aferon, por ke la distrikto marŝu antaŭen laŭ la vojo de sinteza disvolviĝo.

Bona sezono por kapti angilojn



Xiyuan-hotelo volonte servos al vi

de DA ŬEJ



Xiyuan-hotelo

Xiyuan (Ŝijjŭan), unu el la hoteloj asignitaj por la 71-a UK en Pekino, kun sincero akceptos vin, kongresanojn el diversaj landoj.

Xiyuan-hotelo en Erligoŭ okcidente de Pekino estas moderna hotelo distingiganta per sia bela formo: La L-forma domego ĉ. 100 metrojn alta rigardas sudorienten; la ekstera muro estas segilforma kun fenestroj frontantaj al sudoriento kaj sudokcidento por eviti la nordokcidentan venton en vintro kaj rektan radiadon de la suno en somero.

La hotelo havas entute 30 etaĝojn, el kiuj 3 estas sub la tero. Antaŭ la domego kuŝas iluminata fontano kun areo de 300 kvadrataj metroj. Super la fontano ar-

kas du delikataj pontoj el blanka marmoro. Post la fontano, ĉe la portalo staras eleganta smirgita vitra ekranego kun "Ok Feoj Transirantaj Maron", unu el la ĉinaj mitoj.


Post la portalo estas kvadrata vestiblo 12 metrojn alta, vasta kaj eleganta. Tie lumas lustro el seskoloraj alumini-alojaj lamenoj. La lumo de la lampoj harmonias kun la rebrilo de la planko el marmoro kaj granito.

En la hotelo estas 709 apartamentoj kiuj povas akcepti 1 347 gastojn, inkl. de apartamentoj unuĉambraj, duĉambraj kaj superklasaj. La ĉambroaranĝo rompis la tradician kvadratan tipon kaj estas riĉa je vario. La ĉam-


broj vastaj, helaj, komfortaj kaj elegante meblitaj estas provizitaj per klimatizilo, sekuriga sonorilo, akustikaĵo kaj fermcirkvita televido.

En la gimnastejo sur la tria etaĝo estas serio da gimnastiloj kun kompare granda forteco. Ĝi kune kun la saŭno, masaĝ-ĉambro kaj naĝbaseno sur la sama etaĝo donas oportunecon al gastoj en korpoekzercado kaj refreŝigado. La ĝardeneto sur la kvara-etaĝa teraso servas kiel ripozejo de la gastoj.

La plej superaj 2 etaĝoj de la domo estas okangula 21-metra tamburforma turo kun diametro de 32 metroj. En la 25-a etaĝo brilas sonregataj koloraj lampoj



Naĝbaseno



Gimnastejo

por drinkejo kaj balejo kun luma planko. La 26-a etaĝo estas turniĝa restoracio, kiu povas akcepti 200 gastojn. La planko de la restoracio povas turniĝi dekstrume kaj livume, kaj unu cirklo bezonas almenaŭ 45 minutojn. En ĝi estas granda teleskopo. Prenante bongustajn trinkaĵojn kaj marĝaĵojn, oni povas ĝui samtempe belajn pejzaĝojn de la tuta urbo.

En la hotelo servas vendejo, poŝtoŝtanco, deponejo, lesivejo kaj taksio. Meze de la hotelo laboras ok aŭtomataj liftoj el kiuj tri estas vitraj.

La hotelo havas 13 grandajn kaj malgrandajn restoraciojn. Estas menciinda la Islama Restoracio okcidente en la vestiblo, kio mankas al ĉiuj aliaj hoteloj

de Pekino. Tie oni povas ĝui pladojn ĉefe el bovaĵo kaj ŝafaĵo de Ŝinĝjang-a gastronomio. Estas precipe bongusta la tradicia fama plado rostita ŝafkruraĵo. Ĝi, kun fragila eksteriĝo kaj delikata internaĵo, ne estas tro grasa.

La aliaj restoracioj kontentigas gastojn per diversaj ĉinaj kaj eŭropaj pladoj. La ĉinaj manĝaĵoj konsistas ĉefe el la pladoj de Ŝandong, Siĉŭan kaj Jangĝoŭ. La ŝandong-pladoj preparitaj en Penglajĉun-restoracio estas unu el la ĉefaj pladsistemoj de Ĉinio kaj famas pro preparado de marproduktaĵoj, kiaj holoturiano kun ŝenoprazo, olefrititaj konkuloj, dolĉacida karmo k.a. La eŭropaj pladoj konsistas el francaj, britaj kaj rusaj. Inter ili estas franca bovfileo en funga saŭco, brita

koko-kotleto kaj rusa kok-rulaĵo kun butero.

De sia ekfunkcio aŭguste de 1984 la hotelo ĉiam observas la principon "gastoj kaj amikeco estas la unuaj", ĝi akceptis diverslandajn gastojn kaj vizitgrupojn al Ĉinio per fervora, sincera kaj zorgema servo.

La hotelisto Dong Jun sentis grandan ĝojon, informiĝinte, ke okazos en Pekino la 71-a UK. Li petis min transdoni liajn plej sincerajn salutojn kaj korajn bondezirojn al esperantistoj el ĉiuj partoj de la mondo. En la nomo de ĉiuj laborantoj de la hotelo, li esprimis sian varman bonvenon al ĉiuj kongresanoj kaj fortan volon agrabligi la kongresanojn per kontentiga servo kaj deziris brillan sukceson al la kongreso.



Restoracio

Pledo por la terminologia laboro

La elirpunkto de miaj pripensoj estas la konstato, ke eĉ la plej bonaj esperantaj gazetoj uzas la terminojn por ĉiutagaĵoj ne u n u e c e. Mi nun citas el la plej altkvalitaj gazetoj: En "EL POPOLA ĈINIO" nr-o 2/1984 mi trovis sur paĝo 21: "En la lastaj jaroj Ĉinio atingis ĝojindajn sukcesojn en la aplikado de *mikrokomputiloj* por la aŭtomata regado en industria produktado." Kontraŭe, en la pli nuntempa numero 9/1985 mi legas sur la paĝo 25: ". . . se oni uzos *mikrokomputeron* sur la ŝipo por fari kalkuladon pri la *donitaĵoj* de la navigacio." La relative nova dumonata gazeto INTERNACIA KOMPUTADO amase skribas pri *datumoj*, prilaboritaj de (mikro-) *komputiloj*, kaj "MONATO" en la n-ro 5-6/1984 atakas ĝin per senindulga polemiko kaj damnas la vortojn *komputi*, *komputilo* ktp, defendante la *komputorojn*. Kiuj pravas?

La vojon al la respondo montras la dokumento "Terminologiaj principoj de Esperanto", publikigita en "der esperantist" (organo de Esperanto-Asocio en Germana Demokratia Respubliko), en la n-ro 132 (4/1985), kaj ellaborita de Wera Dehler, kunlabore kun 30 kapablaj eminentuloj el multaj landoj, kaj inkludante la internacian terminologian normon ISO TC 37. En tiu dokumento ni trovas difinojn pri

la plej gravaj terminoj de la terminologio mem, krome la bazajn terminologiajn principojn, kaj —ĉefe—la detale ellaboritajn paŝojn de terminografia laboro, kaj —nur kiel lastan paŝon—la metodojn de nomado por la respektiva objekto. Mi nun nur provas resume prezenti la "paŝojn de terminografia laboro", por trovi respondon al la komence levita demando.

Paŝo 1: Limigo de la fako

Paŝo 2: Kolektado kaj analizo de fontmaterialo

Paŝo 3: Sistemigo kaj klasifikado

Paŝo 4: Difinado

Paŝo 5: Nomado

Skize mi nun provos apliki tiun metodon rilate al nia demando.

1. Por limigi la fakon, mi nur esploru la terenon ĉirkaŭ la objekto kun la angla termino "micro computer".

2. Kolektante fontmaterialojn, mi konstatas la jenon: Ekzistas la iomete malnoviĝinta kvinlingva fakvortaro el la jaro 1972, krome la difinproponoj de la tre diligenta s-ro Christian Bertin el Francio kaj de Michael Lennartz el GDR (sed ambaŭ ne oficiale publikigitaj!), krome la Esperanta-ĉeĥa fakvortaro el Praha 1982 kaj la Komputada

Baza Terminaro de Kalckhoff/Pick el FRG 1985 (sed ambaŭ ne enhavas proponojn pri nia moderna objekto!). Sed la ĉefa fonto por koncerna materialo estas la ses libroj kun la prelegtekstoj de INTERKOMPUTO (Budapeŝt 1982) kaj la ĝis nun sep kajeroj de la gazeto Internacia Komputado (ekde decembro 1983), ĉiuj el ili presitaj en granda kvanto kaj legataj en multaj landoj, eĉ far neesperantistoj. (Pardonon, se mi eble forgesis menciigi kromajn neampleksajn fontojn.)

Analizante la fontmaterialojn, mi konstatas, ke la plimulto el la plej diversaj aŭtoroj jam trovis preskaŭ unuecan aplikon de terminoj. Kun certeco mi ekzemple resumas, ke la granda plejmulto uzas la terminojn "komputilo" kaj "mikrokomputilo", sed nur minoritato kolere defendas la esprimojn "komputero" kaj "komputoro". Mi eĉ trovas, ke la ĉefredaktinto de PIV akceptis la formon "komputilo", tiel korektante la grandan vortaron (publikigita noto en "der esperantist" n-ro 124, 2/84, p. 30). Tio signifas, ke mi dum la kolektado de fontmaterialo devas registri la oftecon de la apero de la terminoj. Al tiu konkludo min ankaŭ pelas la tre interesa artikolo de Rüdiger Eichholz el Kanado en "El Popola Ĉinio", n-ro 4/85, kun la signifoplena titolo: "La motoro de la evoluo

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: unu internacia respondkupon por kvin vortoj aŭ mallongigoj. **Por fotoj:** unu intern. resp. kup. por spaco de unu linio. **Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato.** Esp-organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

- * Dez. kor. kun filatelistoj kolektante E-filatelaĵojn. Tiuj, kiuj sendos E-filat., ricevos la samon pri 71a UK kaj ĉinajn p.m. Adreso: s-ano Feng Kuang, Dagu Huagong Chang, Tanggu, Tianjin, Ĉinio.
- * Se vi studas jagon, budhismon ktp., turnu vin al nova Superklubo Internacia: SK, Box 27, Postamt, Minsk, 220050, USSR.
- * 22j. Josef Sucik, Masna 9, 702 00 Ostrava 1, Ĉeĥoslovakio, dez. konatiĝi kun ĉina esperantist(in)o pri fotografado, muziko kaj literaturo.
- * Filatela Kooperativo interŝanĝos ĉiun nombron da pm. pri floro,

faŭno, arto, sporto, ktp. Serion kontraŭ serio. Specialaj mendoj pri valoraj filatelaĵoj per antaŭa interkonsento. Filatelista Kooperativo, Jacek Krassowski, 65-958 Zielona Gora 8, P.K. 166, Pollando.

- * Nove fondita libroservo peras E-eldonaĵojn de ĉiuj jugoslavaj eldonistoj. Petu senpagan katalogon. Preskaŭ ĉion nuntempe haveblan en la jugoslava E-merkato, vi trovos unuloke, kun rabatoj ĝis 50% por grandkvantaj aĉetoj. Konfidu viajn mendojn al nia libroservo: Esperantoklubo "Koko", B. Markaca 1, YU-43350 Durdevac, Jugoslavio.
- * PAU-aj kolegiroj urĝe serĉas por ekspozicii ĉiuspecajn afiŝojn pri Esperanto kaj ĉiuspecajn dokumentojn pri karnavaloj kaj ludiloj en la mondo. Rekomencos per poŝtkartoj/prospektoj pri PAU kaj regiono, aŭ dokumentoj pri la koncernaj temoj. Dankon! Esp.-Klubo Kolegio J. D'Albret, Avenue des Lauriers, 64000 PAU, Francio.
- * Junulinoj, 16 ĝis 19-jaraj lernantinoj, deziras korespondi tutmonde. Esperanto-Grupo, Dom "Lizika Janĉar", Titova 24a 62000 Maribor, Jugoslavio.
- * 42-jara instruistino volus kores-

pondi kun geesperantistoj en Ĉinio. Ĉetova Viktorija, Bulv, Mirnij 6-29, Ĥersono, USSR-325000.

- * Mi volas korespondi kun ĉinaj esperantistoj por lerni ĉinan lingvon. Boĉkarev Andrej, Bijsk-33 Ab. kesto 14, U.S.S.R. 659333.
- * Gert Heintze, Rheinauer Ring 121/1, D-7550 Rastatt, FR Germanio, dez. kor. kun ĉino.
- * Mezaĝa esperantisto el GDR lernas ĉinan lingvon kaj serĉas ĉinan amik(in)on por ĉine korespondi. Reiner Grunert, Scharnhorststr. 14, 7030 Leipzig.
- * 16j. knabino deziras korespondi kun amikoj el Azio, Afriko kaj Ameriko pri diversaj temoj. Peter Anna, St. de Papp Pal 20, 24321 Kishegyes, Jugoslavio.
- * 18-jara lernanto Edmundo Eross, Frumoasa-II, R-4135, Harghita, Rumanio, dez. kor. kun kolektantoj de pm., bk., ĉefe el Ĉinio, Japanio, Francio, USSR, Esperante, rumane aŭ hungare.
- * 20j. litova junulo, pri E-movado, lingvoj, muziko, filatelo: La adreso: Gimaras Žiaunys, Žemaitijos 9-25, SU-235500 Mažeikiai, Litovio, Sovetunio.

estas la uzado de la plej granda nombro".

3. La sistemigo kaj klasifiko de la trovita materialo estas komplika tasko plenumenda pretere far internacia kolektivo.

4. La difinado same bezonas diligentan laboron kaj ofte jam okazos konekse kun la kvina paŝo.

5. Por la nomado, Wera Dehler en la nomita artikolo do-

nas tre utilajn indikojn pri postuloj al la termino.

Revenante al nia komenca demando, mi konkludas, ke jam ekzistas kaj la materialo kaj la metodoj, por unusence respondi al la demando, kiuj aŭtoroj pravas, se ili uzas tiun aŭ alian terminon por iu moderna objekto. Sed necesas, ke esperantistoj formu internaciajn terminologiajn kolektivojn, agu laŭ la

"paŝoj de la terminografia laboro", kaj finfine eldonu fakvortarojn, el kiuj ĉiu povos ĉerpi la ĝustajn terminojn ankaŭ por tiuj ĉiutagaĵoj de la nuna (aŭ morgaŭa) tago, kiel ekzemple por "mikrokomputilo". Eĉ jam ekzistas oficiala organo, kiu celas organizi tian laboron. Temas pri la Terminologia Sekcio de UEA, H-1368 Budapeŝt, Pf. 193, Hungario, kiu daŭre serĉas kunlaborantojn.

Rekomendoj pri la landnomoj

1. Pro respekto al la tradicio, kaj en pacema spirito, ni deklaras, ke landnomo estas taŭga, se ĉiuj aŭ la granda plimulto senkonteste uzas la saman formon.

2. En okazo de konflikto inter du aŭ pluraj formoj por unu sama landnomo aŭ inter la uzo de kategorio aŭ la alia por unu sama radiko, la Akademio rekomendas preferi la plej internacian landnomon kaj tiel obei al la 15-a Regulo de la Fundamento.

3. La Akademio rekomendas konsideri, ke la signifo-rilatoj inter la landnomoj kaj la koncernaj landano-nomoj ĉiam estas

principe la samaj, kiu ajn estas la kategorio de la landnomoj. Ekz-e, Angl-ujo/-io Angloj kaj en la alia kategorio Nederland-o — Nederland-anoj.

4. Principe estas malrekomendite nove formi nomon per iu internacia "sufikso" aŭ sufikse uzata fremda vorto (-io,-(i)stano, . . .), se la tiel ricevita landnomo ne jam ekzistas internacie.

Rimarkoj de la Prezidanto


1. Per tiuj rekomendoj la Akademio esperas marki la finon de la diseriga tendenco en la landnomoj. Devus instaliĝi tendenco al unuecigo farita sur sana bazo tradicia kaj fundamenta.

2. Ni memorigas, ke la Akademio jam publikigis liston de 32 landnomoj kaj de 15 landano-nomoj en la Oka Oficiala Aldono al la Universala Vortaro (Aktoj de la Akademio, II, p. 13-14). Tiuj nomoj aldoniĝas al la kelkaj nomoj troveblaj en la Fundamento. Ĉiu disciplinema Esperantisto severe atentis tiujn listojn.

3. La Akademio ne intencas oficialigi pliajn nomojn. Sed ĉar oni diversflanke petis tian paŝon, ĝi decidis anstataŭe starigi liston de "normaj" landaj kaj landanaj nomoj, kiu povos subiĝi al revizio, kiam necesos.

A. A.

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO



- 1 Pekino
- 2 Ŝantoŭ
- 3 Tibeto
- 4 Ŝinĝjang
- 5 Harbin
- 6 Jan'an
- 7 Ĉengdu
- 8 Ŝenjang
- 9 Suĝoŭ


Boato kaj fluanta akvo

Boato maldiligente kuŝis sur rivero kaj diris al fluanta akvo: "Mia kara amiko, helpu min, por ke mi iru antaŭen!" La akvo jesis kaj puŝis la boaton antaŭen ŝanceliĝantan. La boato saltis de ĝojo: "He, kiel plezuriga estas la antaŭenmarŝo!"

La akvo puŝis la boaton en kurbiĝon de la rivero kaj diris:

"Mi jam plenumis mian devon. Nun vi devas peni mem. Via vojo estas tre longa. Ĉiam marŝu antaŭen! Ĝis revido!" tion dirinte, la akvo forfluis.

La boato trankvile kuŝis en la kurbiĝo ŝanceliĝante. Ĝi penadis antaŭen, sed sukcesis movi sin nur iomete. Ĝi perdis kuraĝon: "Ho, marŝo ja estas tiel malfacila. Do lasu! Kian utilon havas la antaŭenmarŝo!" Ĝi sin konsolis. "Ĉi tie ne estas malbone. Ĉarmas floroj kaj herboj, kantas birdoj sur arboj kaj ŝvebas blankaj nuboj en la ĉielo..." Sekve, ĝi kuŝis ĉi tie kaj sin sunumis.



Malbona fino de sorgo

Sur unu folio de sorgo ek troviĝis fiinsektoj. Birdo alflugis por ilin forigi de ĝi, sed ĝi kapskuis, dirante:

"Ne, mi ne bezonas. Kion al mi povas fari la malgrandaj fiinsektoj?"

Post kelkaj tagoj, fiinsektoj troviĝis sur aliaj tri folioj kaj birdoj ree volis ilin forigi por ĝi, sed la sorgo rifuzis:

"Ne, mi ne bezonas. Kion al mi povas fari tiuj kelkaj malgrandaj fiinsektoj?"

Pasis aliaj kelkaj tagoj. Sur ĉiuj folioj de la sorgo ek rampis fiinsektoj. La verdaj folioj flaviĝis kaj velkis. Nur tiam la sorgo maltrankviliĝis kaj deziris, ke birdoj ilin forigu. Tamen ĝi jam estas mortanta kaj malvigla.

Kanto kaj plumoj de pavo

En la konkurso de birdoj pri beleco pavo disetendis sian belan voston, kio estigis grandan admiron:

"Brave!"


"Tute simila al perla ventumilo!"

"Kiel frumatena kolornubo!"

Antaŭ la admirado la pavo fiere levis sian kapon.

Tiam iu birdeto alflugis kaj petis, ke la pavo kantu.

"Ĉu estas malfacile por mi kanti!" levinte siajn ŝultrojn, la pavo ekkantis plengorĝe. Sed nenian aplaŭdon ĝi aŭdis. Rigardinte ĉirkaŭen, la pavo fine komprenis, ke ĝia kanto ne estas tiel bela kiel la plumoj. Tiam ĝi ruĝiĝis, mallevis sian kapon kaj fermis sian voston.



Tri Gorĝoj de Jangzi-rivero

de LI ĈJANG

Fotoj de LI ĈUNGENG

Jangzi estas la plej granda rivero en Ĉinio. Ĝi, enprenante en sin neĝakvon el la Ĉinghaj-Tibeta Altebenaĵo kaj sin ligante kun multaj riveroj kaj lagoj, impone torentas antaŭen. Trafluinte Siĉŭan-basenon, ĝi zigzagas inter krutaj montoj kaj formas tri gorĝojn kun longeco de 193 ki-


lometroj, kiuj komenciĝas de Bajdiĉeng en Fengĝje, Siĉŭan-provinco, en okcidento kaj finiĝas ĉe la pasejo Nanĝin en Jiĉang, Hubej-provinco, en oriento.

La Tri Gorĝoj estas la komuna nomo de la gorĝoj Ĉjutang, Uŝja kaj Ŝjiling. Ambaŭborde de Jangzi-rivero inter la gorĝoj staras

groteskaj montpintoj kaj krutaj rokmuroj. Al la ĉarma pitoreskejo ne mankas historiaj restaĵoj kaj vidindaĵoj. Cirkulas nemalmultaj mitoj pri la Tri Gorĝoj. De antikve la Tri Gorĝoj estas fama pitoreskejo. En la historio multaj literaturistoj kaj pentristoj verkis tie poemojn kaj faris pentraĵojn pri la bela pejzaĝo. Post kiam malfermiĝis vojaĝlinio de la Tri Gorĝoj en 1980, ili akceptis grandan nombron da turistoj el diversaj lokoj de la mondo.

La antikva konstruaĵo Bajdiĉeng

Foto de ĈJŬAN JUŜJI



Nuntempe ses luksaj plezurŝipoj navigas sur Jangzi-rivero inter la urboj Ĉongĉing kaj Uhan kaj bone servas al turistoj. La ŝipoj klimatizitaj havas belan aspekton kaj proviziĝas per belvidejo, amuzejo kaj dancejo. Sur la ŝipoj turistoj povas ĝui bongustajn ĉinajn kaj eŭrop-stilajn pladojn. Lertaj masaĝistoj per la tradicia ĉina masaĝo kuracas aŭ senlacigas ilin. Bone trejnitaj ĉiĉeronoj senpage instruas sur la ŝipoj Tajĝiĉŭan-gimnastikon, tradician ĉinan luktarton. Dum kvin tagoj da vojaĝo turistoj povas gaje distriĝi en la komforta medio.

Frumatene plezurŝipo kun turistoj forlasas la monturbon Ĉongĉing, veturas orienten, preter la urboj Ĉangŝou kaj Fuling kun historio de miloj da jaroj, kaj atingas vespere la monton Pingdu ĉe la norda bordo de la rivero. Sur la monto sidas dekoj da grandaj temploj. Legendo di-



La plezurŝipo "Kunlun" forlasas Ĉongĉing.

ras, ke tie loĝas la dio de infero, kiu decidas la sorton de la homoj, kaj la animo de mortinto devas anonci sin en la infero. Tio estas pura absurdaĵo! Tamen tie estas versimilaj kaj viveplenaj la statuoj de inferaj diabloj kaj sen nombraj homfiguroj multe suferantaj en la infero, kio vidigas altan skulpturon de la antikvaj ĉinaj laboruloj kaj altiras al si turistojn.

Frumatene de la sekva tago oni ankras la ŝipon en la mezo de la rivero 50 kilometrojn for de Ĝongŝjan-gubernio. Tie la turistoj veturas per pramo al la bordo por rigardi la antikvan domon "Trezora Ŝtono" kun aparta stilo, konstruitan sur sola monteto norde de la rivero. Legendo diras, ke la ĉiufanke kruta monteto estis ŝtono falinta de sur la ĉielo flikata de Njuŭa, tial la monteto ricevis la nomon Trezora Ŝtono. Antaŭ 300 jaroj oni konstruis templon sur la supro. Por

ascendi kaj descendi la monton, oni devis piedpremi ŝtonfendojn kaj teni per la manoj ferĉenon. Estis tre maloportune! Poste, sur la rokmuro fronte al la rivero oni konstruis pagodoforman lignan domon kun 12 etaĝoj altan je 56 metroj. Oni povas ascendi la montsupron laŭ ŝtupoj. Tie oni ĉirkaŭprenas per la rigardo la riveron kaj ricevas impreson, ke la rivero ligiĝas kun la ĉielo. Rigardate de malproksime, la montaro estas kun ŝtuparaj kampoj. Rigardate de proksime, la monto "Trezora Ŝtono" vestiĝas per bambuoj kaj pinoj. Tiam prezentiĝas antaŭ la okuloj kampa vidaĵo kaj natura pejzaĝo.

Posttagmeze oni ankras la plezurŝipon ĉe la kajo de la urbo Ŭanŝjan de Siĉŭan-provinco norde de la rivero. La urbo estas ĉirkaŭita de montoj. En la foiro estas aĉeteblaj bambuaj kaj rotangaj produktaĵoj, teo, oranĝoj kaj pampelmusoj.

Matene de la tria tago, kiam la suno leviĝas, la sireno longe sonas kaj anoncas la baldaŭan alvenon al la Tri Gorĝoj. Rigardate de malproksime, iu monto baras la vojon al la rivero. Sur la monto staras antikva konstruaĵo nomata Bajdiĉeng. Kiam la ŝipo abrupte sin turnas dekstren de Bajdiĉeng, prezentiĝas ambaŭborde de la rivero du montoj, kiuj staras vid-al-vide, pli ol 500 metrojn super la akvosurfaco, kvazaŭ grandioza pordego defendus la riveron. Tio estas la fama Kujmen-pasejo.

Enirinte la pasejon, oni trovas, ke ambaŭborde de la rivero ondas montĉenoj kaj la surfaco de la rivero fariĝas subite mallarĝa je nur 100-150 metroj, sed la rivero torentas nehaltigeble. Ĉjutang-gorĝo kun longeco de 8 kilometroj estas la plej mallonga el la tri gorĝoj. Sed ĝi estas la plej impona, kun pejzaĝo plej grandioza. Ĉirkaŭe ne mankas famaj

vidindejoj, kiaj Fengŝjang-gorĝeto kun arkeologia valoro kaj Ĉŭokaj-gorĝeto, kie laŭ legendo feino buĉas ferocan drakon.

Uŝja-gorĝo estas 44 kilometrojn longa. Tie, ambaŭborde de la rivero, dissemiĝas groteskaj rokoj kaj staras altaj krutaĵoj, kaj la gorĝo impresas kiel zigzaga galerio. Malantaŭ la krutaĵoj estas montpintoj, ĉiu kun longeco de ĉ. 2 000 metroj super la marnivelo. En la montaro kreskas densaj arbaroj. Tie majestas 12 pintoj de la fama Uŝan-monto. Legendo diras, ke ili transformiĝis el 12 feinoj, venintaj de la ĉielo al la gorĝo por piloti la ŝipojn. Ili gardis tie tage kaj nokte kaj post longa tempo ili fariĝis montpintoj, el kiuj la plej ĉarma estas Feino-pinto norde de la gorĝo. En la supro de la pinto estas granda ŝtona kolono, kiu kvazaŭ svelta knabino rigardas la riveron.


Ŝjiling-gorĝo estas la plej longa el la tri gorĝoj. Kun longeco de 76 kilometroj ĝi ampleksas diverslongajn gorĝetojn, kiuj rice-

vis sian nomon pro la formo de roko aŭ pro rilata popola legendo. La gorĝeto Militarta Libro kun Glavo norde de la rivero estas 4.5 kilometrojn longa. Sur la rokmuro estas roko simila al libro en alta rokfendo, kaj sub ĝi estas longa ŝtono simila al akra glavo etendita en la riveron. Pro tio la gorĝeto ricevis la nomon. Sur alia kruta rokmuro videblas rokoj similaj al bova hepato kaj ĉevala pulmo. Kaj gorĝeto en tiu loko nomiĝas do Bova Hepato kaj Ĉevala Pulmo. Estas interesa la Ombra Gorĝo ĉe la elirejo de la Tri Gorĝoj. Sur la monto de la suda bordo kuŝas kvar rokoj. Ĉe la sunsubiro ili aspektas kiel homfiguroj en ombro-teatraĵo, tial oni donis al ĝi tian nomon. Ŝjiling-gorĝo estas fama pro siaj staraj rokoj, torenta fluo kaj zigzaga naviglinio.


Trafluinte Nanĝin, la lastan pasejon de la Tri Gorĝoj, la rivero larĝiĝas abrupte de 300 al pli ol 2 000 metroj kaj ekfluas malrapide. Ambaŭborde de la rivero etendiĝas Ĝjanganhe-

naĵo vestita per senlima verdaĵo. Kiam oni ankras la ŝipon ĉe la urbo Jiĉang, la turistoj povas veturi per buso por rigardi la urbon kaj la akvobaraĵon Geĝouba, kiu estas la unua en Jangzi-rivero, kun longeco de 2 561 metroj kaj alteco de 70 metroj. Tie funkcias la plej granda hidroelektrejo de Ĉinio.

La lastajn du tagojn de la vojaĝo la plezurŝipo veturas sur la larĝa rivero. Ĉe Ĉenglingĝji la turistoj povas surbordiĝi kaj veturi per buso por rigardi Jŭejang en Hunan-provinco, urbon riĉan je fiŝoj kaj rizo, ĉe la bordo de la lago Dongting. Ankaŭ Jŭejang estas antikva urbo kun longa kultura historio. Jŭejang-pavilono estas unu el la tri famaj pavilonoj sude de Jangzi-rivero, kun granda kvanto da antikvaj kaligrafiaĵoj. Fine la ŝipo atingas Uhan, gravan urbon de Hubej-provinco, de kie oni povas veturi al naŭ provincoj en la meza baseno de la rivero, kaj tiel finiĝas la neforgesebla vojaĝo.



Turistoj rigardas pejzaĝon de unu el la Tri Gorĝoj de Jangzi-rivero.





Ušja-gorĝo



Ĉe la rivero

Fremdlandaj turistoj sur la luksa plezurŝipo "Kunlun"







Turistoj ĉe gorĝeto

La domo "Trezora Ŝtono"

La antikva Ŭanŝouĝardeno ĉe la rivero



ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO

Ĉinaj klasikaj ĝardenoj

de HŪANG ŜJAŬLŪAN



La ĝardeno Ŭangŝi en Suĝoŭ

Foto de ŬANG ŜOŬLJANG

Foŝjang-turo

Foto de ŬANG ŜOŬLJANG



Ĉinio estas unu el la landoj kun plej fruaj ĝardenoj. En la 12-a jarcento a. K. aperis la plej frua ĝardeno. La ĝardeno kun natura pejzaĝo havis multajn kortobirdojn kaj bestojn kaj servis por ĉasado kaj rajdado de imperiestroj kaj nobeloj.

En la dinastioj Ĉin (221 a.K.-207 a. K.) kaj Han (206 a. K. — 220 p. K.) aperis novaj ĝardenoj kun palacaj domoj kiel la ĉefaj kaj estis nomataj palacaj ĝardenoj kun konstruaĵoj. Ili havis ne nur bredejon de kortobirdoj kaj ĉasejon de bestoj, sed ankaŭ ripozejon por imperiestroj, iliaj edzinoj kaj kromedzinoj. En 221 a. K. la Unua Imperiestro de Ĉin-dinastio konstruis en la ĉefurbo Ŝjanjang palacon, kiu estis la plej frua palaca ĝardeno kun konstruaĵoj. Ĝia antaŭa halo Epangong estis tre pompa kaj poste forbruligita en milito. La konstrua skalo de la palaca ĝardeno de Han-dinastio estas pli granda. La imperiestro Udi de Han-dinastio konstruis grandan ĝardenon okcidente de Ĉang'an kiel loĝejon de siaj kromedzinoj.


En la ĝardeno estis rivero, monteto, Tajje-lago, tri insuletoj kaj diversstilaj haloj ĉe monto kaj akvo. Al la ĝardeno ne mankis raraj birdoj kaj bestoj kaj belaj floroj kaj herboj. Tie oni sentis sin kvazaŭ en fea lando.

En Han-dinastio malmultaj nobeloj kaj riĉaj komercistoj komencis konstrui ĝardenojn en sia privata loĝejo. En iliaj ĝardenoj estis luksaj konstruaĵoj, lagetoj, floroj, herboj kaj arboj. La grandeco kaj lukseco de la privataj ĝardenoj montris la riĉecon de la mastroj.

La daŭra disvolviĝo de la ĉinaj klasikaj ĝardenoj manifestiĝis en tio, ke oni garnis ilin per poemoj kaj kaligrafaĵoj. Tiel aperis poeziaj pejzaĝaj ĝardenoj kaj iom post iom formiĝis la ĉefa karakterizaĵo de la ĉinaj klasikaj ĝardenoj. En 1117 p.K. la imperiestro Hujzong de Song-dinastio uzis ses jarojn por konstrui la ĝardenon Bajbuŝan. En la ĝardeno ĉarmis monteto, prosperis bambuaro, zigzagis fluo kaj inter ili staris kioskoj kaj pavilonoj.

Promenante sur pado, oni sentis sin kvazaŭ en pejzaĝa bildo. Oni rigardis ĝin kiel ekzemplon de imperiestra ĝardeno kun monteto kaj akvo.

La dinastioj Ming (1368-1644 p. K.) kaj Ĉing (1644-1911 p. K.) ne nur heredis la karakterizaĵojn de la ĝardenoj de la antaŭaj dinastioj kaj sorbis la eminentajn konstruajn artojn de sudaj kaj nordaj ĝardenoj, sed ankaŭ disvolvis sian ĝarden-konstruan arton. Precipe imperiestraj ĝardenoj de Ĉing-dinastio servis kiel imperiestraj palacoj ekster la ĉefurbo. Krom ĉarma medio por ripozo kaj distriĝo, oni faris en la ĝardenoj ankaŭ domojn por okazigi gravajn ceremoniojn kaj trakti politikajn aferojn kaj loĝdomojn por imperiestro kaj por liaj edzino kaj kromedzinoj. La imperiestro Kangŝji (1662-1722 p. K. sur trono) konstruigis en la antaŭurbo de Pekino la ĝardenon Ĉangĉunjŭan, kiu estis la unua imperiestra ĝardeno ekster la ĉefurbo. En 1703 li konstruis la grandiozan Someruman Montvilaon en Ĉengde de Hebej-provin-



Sjeĉujŭan-ĝardeno en la Somera Palaco



Tajling, unu el la Okcidentaj Maŭzoleoj de Ĉing-dinastio en Jiŝjan, Hebej-provinco

co. En 1725 oni konstruis la palacon Jŭanmingjŭan en Pekino. Ĝi kun multaj pejzaĝoj similaj al famaj pejzaĝoj de la suda akvoriĉa regiono estis nomata “Ĝardeno kun Dekmil Ĝardenoj”. En 1860 la palaco estis forbruligita de la britaj kaj francaj agresantoj. Nun restas nur ĝia ruino, laŭ kiu oni tamen povas imagi ĝian grandiozecon.

La Somera Palaco en la okcidenta antaŭurbo de Pekino estas la plej alloga imperiestra ĝardeno de Ĉing-dinastio. Ĝia konstruado daŭris dudek kvin jarojn ekde 1750. La palaco konsistanta el Ŭanŝou-monto kaj Kunming-lago karakteriziĝas per granda skalo, harmonia dispozicio, elegantaj konstruaĵoj kaj ĉarmaj pejzaĝoj. Ĝi estas la plej pompa klasika ĝardeno. Ŭanŝou-monto estas ĝia centro. La alta turo Foŝjang ĉe la monttallo estas la kerno de ĝia konstruaĵaro. La farbita Longa Koridoro kun longeco de pli ol 700 metroj inter la monto kaj lago interligas grupojn da konstruaĵoj antaŭ la monto. En la palaco ĉarmas la ĝardeno Ŝeĉjŭan konstruita imite laŭ Ĝjiĉangjŭan en la suda

urbo Uŝji. Pro ĝia eleganteco oni nomas ĝin “Parko en Parko”.

En la dinastioj Ming kaj Ĉing prosperis la privataj familiaj ĝardenoj. En urboj kaj urbetoj kun abundaj produktaĵoj, favoraj naturaj kondiĉoj kaj alte disvolvita kulturo multas privataj familiaj ĝardenoj, ĉiu kun sia propra stilo. Ĉar ili estis parto de privataj loĝejoj, tial oni devis zorge dekorecii por fari malsamajn vidaĵojn en limigita spaco kaj produkti artan efikon de interligiĝo kaj kontrasto. Suĝou, Hangĝou, Uŝji, Jangĝou kaj aliaj abundas je privataj familiaj ĝardenoj.

La ĝardenoj de Suĝou estas tre belaj kaj elegantaj. En malgran-

da spaco oni povas vidi pejzaĝojn analogajn al la naturaj. Oni faris lagojn kaj montojn laŭ lokaj kondiĉoj, konstruis kioskojn ĉe akvo kaj plantis florojn kaj arbojn, kiuj ĉiuj impresas kiel naturaj pejzaĝoj. La ĝardeno Canglangting reprezentas la ĝardenan konstruadon de Song-dinastio (960-1279 p. K.). Ĝi havas artefaritan monteton en la centro. Sur la montokresto staras kiosko. Oriente oni povas rigardi fiŝojn kaj okcidente surkvajn kioskojn interligitajn per zigzaga koridoro. La medio estas kvieta. La ĝardeno Ŝizilin konstruiĝis en Jŭan-dinastio (1271-1368 p. K.). Ĝi famas pro siaj artisme aranĝitaj rokaĵoj kaj zigzagaj vojetoj tra



diversaj grotoj. Irante en la grotoj, oni sentas sin kvazaŭ en labirinto. Multaj rokaĵoj similas al diverspozaj leonoj. Tial la ĝardeno ricevis la nomon Ŝizilin, kiu signifas leonaron en la ĉina lingvo. La ĝardeno Ĝŭoĝeng estas la plej granda en Suĝoŭ. Ĝi havas lagon en la centro. Apud ĉiu ĝia kiosko oni povas vidi akvo-fluon. Ĝiaj dekelkaj kioskoj diferencas unu de alia. Ŝizilin povas esti rigardata kiel reprezentanto de la alte taksataj pompaj ĝardenoj de Ming-dinastio.

Imperiestroj devigis la popolon konstrui maŭzoleon por ili. Tiel aperis maŭzolea ĝardeno. Famaj estas la Dek Tri Maŭzoleoj de Ming-dinastio en la gubernio Ĉangping de Pekino kaj la Orienta kaj Okcidenta Maŭzoleoj de Ĉing-dinastio en la provinco Hebej. Kun enkonduko de budhismo kaj naskiĝo de taoismo en diversaj lokoj de Ĉinio aperis temploj kun ĝardenoj. La klasikaj ĝardenoj en diversaj lokoj de Ĉinio portas ĉiu sian lokan koloron kaj nacian stilon.

La ĉinaj klasikaj ĝardenoj diferencas de eksterlandaj ĝardenoj per belaj montoj kaj akvo kaj havas tre altan artan nivelon. Ili estas malsamaj ol la italaj platformaj ĝardenoj, francaj planimetriaj ĝardenoj kaj tiuj de aliaj eŭropaj landoj. La ĉinaj ĝardenoj



Ĉinghuj-ĝardeno en Sunde-gubernio, Ĝuangdong-provinco

akcentas ne la belon de arto kaj konstruoj, sed tiun de la naturo. La ĉinaj klasikaj ĝardenoj portas tri ĉefajn karakterizaĵojn: unue, ili konstruiĝis laŭ lokaj kondiĉoj. Laŭ malsamaj naturaj kondiĉoj, malsamaj celoj kaj postuloj de diversaj lokoj, oni konstruis ilin kun iliaj specifaj ecoj kaj apartaj stiloj. Due, ili reaperigis la naturan pejzaĝon. Oni faris montojn kaj lagojn, por ke ili kune kun la konstruaĵoj, floroj kaj arboj estu en harmonia tuto en na-

tura pejzaĝa ĝardeno. Trie, iliaj vidaĵoj similas al ĉinstilaj pentraĵoj. En ĝarden-konstruado oni faris halojn, kioskojn, pavilonojn, montetojn kaj lagojn kaj plantis florojn kaj arbojn, por ke la pejzaĝoj ricevu simetriecon, kontraston kaj reliefon. En dekoraciado oni ebligas klare distingi inter la ĉefaj kaj neĉefaj pejzaĝoj kaj aranĝas ilin kaŝitaj kaj nekaŝitaj en sporadaj lokoj, por atingi artan efikon ĝui malsaman vidaĵon je ĉiu paŝo.



ĜENG ĜENGJE:

ORIGINALA KULTURA FOIRO



Ventoradoj, ludiloj por infanoj

En la ordinaraj tagoj la parko Tera Altaro estas kvietaj pro malmulte da vizitantoj, sed tie aperis granda spektaklo dum la ĉina tradicia Printempa Festo. En la daŭro de 13 tagoj pli ol 900 000 pekinanoj vizitis la foiron okazintan en la altaro.

En longa historio viziti foiron en la Printempa Festo estas tradicia moro de la pekinanoj. Foiro originas el bazaro ĉe templo oferado. Ĉe oferado aperis bazaro apud templo kaj iom post iom formiĝis fiksita foiro. La ĉefa konsistiga parto de la Tera



Foto de JANG LIMING

Altaro en Pekino finkonstruita en 1530 konsistas el la Oferteraso, Fasta Palaco k. a., kie feŭdaj imperiestroj kultis la dion de la tero. Kun tempopaso ĝi nun fariĝis ripozloko por popolamasoj. La kultura foiro, kiu okazis en la Printempa Festo de 1985, estis originala ekspozicio de moroj de pekinanoj. En la foiro oni povis aĉeti tradiciajn popolajn metiartaĵojn kaj festajn varojn, gustumi etmanĝaĵojn kun loka gusto kaj ĝui ŝatatajn programerojn.

Ankaŭ mi vizitis la foiron en fruprintempa frosto en la festo.


Apenaŭ enirinte la pordon, mi vidis, ke multaj tenas en la mano malgrandan ventoradon, ludilon el bambulamenoj, koloraj paperstrioj kaj sorgotigoj. En vento ĝi turniĝis kun klakoj, kio denisigis la festan atmosferon de la foiro. Ankaŭ fremdlandaj amikoj konkure aĉetis ĝin por sin amuzi.

La plej altira loko estis manĝaj-strato inter pinoj. Tie estis pli ol 130 vendobudoj kun ĉ. cent etmanĝaĵoj de lokaj gustoj.

Ĉe vendobudo de Bejhaj-restoracio mi aĉetis skatolon da


maizpanoj pagod-formaj kun kaveto meze de la fundo, el faruno de maizo kaj sojfabo, kiuj estis unu el la etmanĝaĵoj de la imperiestra kortego de Ĉing-dinastio (1644-1911 p. K.). Iu komizino diris al mi: "En la lastaj tagoj ni vendis unu skatolon ĉiun kvinan minuton. Ni vendus rimarke pli, se ni sukcesus prepari sufiĉe multe."

Nemalmultaj el la vendistoj estas famaj pro sia lerta preparado de etmanĝaĵoj. Al la nomtabulo de sia budo ili kutime donas sian familian nomon, kiel



Stando

Foto de ĜANG LONG



Klientoj ĝuas manĝaĵon
kun aparta gusto.



*Ĉe la enirejo de
la kultura foiro*

Foto de LAŬ BAJ

Ŭang-vendobudo de Brogita Stomako, Hoŭ-vendobudo de Huntuno, Liŭ-vendobudo de Vegetaraj Manĝaĵoj, Li-vendobudo de Milifaruna Kaĉo k. a. Antaŭ Li-vendobudo mi vidis longan vicon da klientoj. Laŭdire tiu vendejo jam havas historion de pli ol cent jaroj. La nun uzataj du gigantaj kupraj kruĉoj po pli ol 20 kilogramojn pezaj estas heredaĵoj de tri generacioj de Li-familio. La ĉefaj materialoj de la kaĉo konsistas el altkvalita milifaruno, aroma osmanto, konfitita pomo, sezamo kaj blanka sukero. Mi vidis, ke apenaŭ la majstro verŝis el kupra kruĉo bolantan akvon en bovleton, ekflariĝis apetitveka aromo.

La enhavoriĉaj prezentadoj faris la foiron amuzejo. Tie oni povis ĝui, krom leondanco, danco kun boato kaj danco sur stilzoj, ankaŭ akrobataĵon, magiaĵon, pupteatraĵon, voĉimitan arton, teatraĵon, luktarton k. a.

Jen sursceniĝis pli-ol-80-jara s-ro Sun Baŭcaj en helflava robo. Li, murmurante antikvan baladon, imitis gracion irmanieron de junulino priskribitan en la balado, kio kaŭzis ridadon foje refoje. Mi trovis, ke ne li eligis la



Foto de **ĜANG LONG**

sonon, sed la viro duonkaŭranta malantaŭ li, kun vizaĝo kovrita per anserpluma ventumilo. Tiu programero estas nomata *ŝuang-hŭang*. Ĉe la unua vido ĝi impresis kiel solludo, sed fakte ĝi estas ludata en lerta kunlaboro inter du artistoj. Laŭdire, tiu interesa programero havis rilaton kun imperiestra patrino Ciŝji, fakta reganto dum la lastaj jaroj de Ĉing-dinastio de Ĉinio. Foje, en celebrado de ŝia naskiĝtago, iu malriĉa artisto estis devigata fari prezentadon, sed malfeliĉe tiam li suferis de raŭkiĝo pro malvarmumo. Por eviti punon li devis kantigi sian filon anstataŭ li, kaŝante lin en sia robo, kaj li akompanis per instrumento kaj imitis diversajn movojn, kvazaŭ li mem kantus. Tiu falso malkaŝiĝis post la falo de la kurteno. Neatendite, ilia ludo estis laŭdita de Ciŝji, ke li postvivis kaj la improvizita ludo ekzistas ĝis nun.

La Fasta Palaco situanta meze de la foiro vere fariĝis ekspoziciejo de pekinaj folkloraj metiartaĵoj. Tie diversaj metiartistoj demonstris antaŭ la publiko la tutan proceson de farado de metiartaĵoj.



Vizito de foiro sur kameloj

Foto de **JANG LIMING**

Sur la eksponejo de pastomodlisto Ĝang Baŭlin prezentiĝis antikva "regno de nanoj". Sur la "teritorio" staras aŭ sidas multaj dandoj, belulinoj, fraŭlinoj, servoknabinoj. . . Kvankam ili estas ne pli grandaj ol malgranda fingro, tamen ili estas bele vestitaj kaj malsammienaj. Se vi longe fiksas vian rigardon sur ili, vi havas la impreson dum momento, kvazaŭ ili ekmoviĝus. Tio vekis varman aplaŭdon ĉe la eksterlandaj spektantoj.

Mi demandis Ĝang: "Kiel vi majstriĝis en modlado?"

"Majstron mi ne meritas, sed fakte mi faris grandan peñon. . ." En sia infaneco Ĝang lernis ĉe fama pastomodlisto Lang Ŝaŭ'an. S-ro Lang modlis homfigurojn el vaporumita glueca rizfaruno miksitita kun farboj. Ili estis subtilaj kaj versimilaj. Tiujn modlaĵojn Ĝang atente pristudis kaj imitis, sed ne blinde. En la postlabora tempo li diligente studis la librojn "Homkorpa Strukturo" kaj "Skizo de Persono", famajn ĉinajn klasikajn verkojn "Songo en Ruĝa Buduaro", "Ĉe Akvorando", "La Okcidenta Ĉambro" kaj grandan nombron da poemoj kaj odoj.

Dank' al tio la pastaj homfiguroj modlitaj de li karakteriziĝas per vivovereco, belaspekto kaj simetrio. Mi kun granda intereso rigardis figuron de plendanta virino modlitan de li laŭ la koncepto de la eposo "Bivoludanta Virino" verkita de la fama poeto Baj Ĝjuji (772-846 p. K.) de Tang-dinastio. La mieno de la ludanto kun duone kaŝita vizaĝo post la bivo donas fortan efikon, ke "kvazaŭ ŝi kantus akompanante sin per bivo."

Tiu ŝanĝiĝo de la popola arto ankaŭ videblis en alispeca metiartaĵo "brunaj homfiguroj", alinome "teatro sur pleto". Jen staras amaso da malgrandaj instruitulaj kaj militistaj figuroj en silkaĵo, kiuj formiĝis el pajla korpo sur argila bazo, kun glavo aŭ skribilo en la mano. Artisto aranĝis ilin sur granda kupra pleto. Se vi delikate frapas la pletorandon per bastoneto, ili ekbatalas per glavoj kaj bastonetoj, kio forte allogas infanojn. En la lastaj jaroj de Ĉing-dinastio oni faris brunan homfiguron, volvinde nur skriban bambupaperon ĉirkaŭ la argila korpo, kaj pentris sur ĝi homan konturon. Ĝi estis simple farbita kaj krude



Ludo de ĵus aĉetitaj trumpetoj

Foto de **JU ĜIŠIN**

modlita. La nuna bruna homfiguro tre similas al vera homo. Tio montras, ke la folkloro estas ligita ĝia fino. La birdo tiris la ŝnuron per la beko kaj ungo alterne, kaj plenumis la tutan faron nur en kelkaj sekundoj.

Loksi kaj pigoj en la birdobazaro de la foiro interesis min per sia lerta varietea prezentado. Ili kapablas bekpreni diversajn malgrandajn objektojn. Ekz. iuj povas forpreni per la beko moneiron de mano de rigardanto, aliaj povas meti triangulan flageton sur flagstango, triaj povas kapti kubon alten ĵetitan de la mastro kaj remeti ĝin en lian manplaton. Pli interese, ke lok-



Maljuna artisto rakontas historieton en la foiro.

sio povoscias supren tiri siteleton. Mi vidis, ke sur ligna vergo estas ligita ŝnureto kun lada siteleto ĉe ĝia fino. La birdo tiris la ŝnuron per la beko kaj ungo alterne, kaj plenumis la tutan faron nur en kelkaj sekundoj.

Iuj akrobataĵoj famiĝis jam delonge. Veterana artisto Baŭ Ŝanlin povis levi per piedo bambuan bastonon kvar metrojn longan kaj bovlodikan en diametro, kun longa tola bendo kaj meti ĝin sur la kapon. Ĉifoje lia disĉiplo dediĉis la superban prezentadon al spektantoj en la foiro.

Diversaj modernaj scienc-teknikaj libroj en la libro-bazaro havis grandan debiton. Ankaŭ prezentado de karikaturoj allogis multajn spektantojn. Sed la vizitantoj plejparte hastis elekti ŝatatajn festajn varojn kaj popularajn metiartaĵojn. La infanoj kun ĝojo alte tenis la festajn donacojn, kiaj diverskoloraj ventoradoj, silkaj floroj, lanternoj, kajtoj, balonoj kaj precipe ruĝaj kandizitaj mespiloj sur bambubastoneto. Ŝajnis, ke ĉiuj intencas porti hejmen printempon kaj feliĉon.

Lukto

Foto de **LI MING**



OK SANIGAJ EKZERCOJ (III)

(Daŭrigo)

II. Orel-ekzercado

Forte premu la orelojn per ambaŭ manplatoj kun la fingropintoj malantaŭen. Frapetu la okcipiton dekelkajn fojojn per la montraĵoj, mezaj kaj ringaj fingroj.

Poste fiksi la fingrojn sur la okcipito. Per la manplatoj premu la orelojn kaj subite formetu ilin. Tion ripetadu dekelkajn fojojn (Bildo 13 kaj 14).

Fine enŝovu la mezajn aŭ montraĵajn fingrojn en la orelojn, turnu ilin trifoje kaj subite fortiru. Tiamaniere ripetadu 3-5 foje (Bildo 15 kaj 16).

Frapeto de la okcipito povas refreŝigi la kapon, akriigi la memoron. Tio bone efikas precipe post la matena vekigo aŭ en la cigo.

Interne de la oreloj laboras sta-

toakustikaj nervoj kondukantaj al la cerbo, tial la ekzercado povas tremigi la timpanajn membranojn kaj sekve akriigi la aŭdodon kaj preventi orelajn malsanojn.

Krome oni povas ekzerci la orelojn laŭ jena maniero:

a. Frotu la eksterajn orelojn per la manplatoj aŭ faldu ilin 30-40 fojojn ĝis kiam la oreloj sentas varmiĝon.

b. Knedu la akupunkturajn punktojn *erĝjating* ĉe la eksteraj oreloj 10-20-foje kaj poste knedu la alian punkton *erĝjaĉjang* (Bildo) per la palpflanko de ambaŭ montraĵajn fingrojn 10-20-foje.

c. Frot-tiru la orellobojn per la dikaj kaj montraĵajn fingrojn 20-30-foje aŭ knedu la heliksojn kelkdek fojojn.

ĉ. Tiru supren, flanken kaj malsupren la heliksojn 3-5 fojojn per la dikaj kaj montraĵajn fingrojn.

Eksciti aŭ masaĝi la difinitajn punktojn sur la eksteraj oreloj povas reguligi kaj restarigi la organisman funkcion de la koncernaj korpopartoj, kio estas utila al kuraco de malsanoj. Frotadi la tutajn eksterajn orelojn povas eksciti nervojn, reguligi la korpan funkcion kaj kuraci perniojn. Masaĝi la akupunkturajn punktojn *erĝjating* kaj *erĝjaĉjang* utilas por restarigi la funkcion de la internaĵoj kaj preventi afekcion. Tirfrotadi la orellobojn estas utila por preventi kapturniĝon, kapdoloron, vertiĝon, dent-doloron kaj okulajn malsanojn. La metodo estas simpla, tamen tre efika.

(Daŭrigota)



Bildo 13




Bildo 15



Bildo 14



Bildo 16



1. Akupunktura punkto *erĝjating*
2. Akupunktura punkto *erĝjaĉjang*
3. Orellobo
4. Helikso

Kulturado de nova klera generacio

de ŜI ŬENJAN

En la pasintaj pli ol 30 jaroj post la paca liberiĝo de Tibeto, la nacieca eduka afero rapide disvolviĝis, kiel la aliaj aferoj. La talentuloj elkulturitaj de la nove funkciigataj lernejoj laboras en diversaj fakoj kaj ludas pli kaj pli gravan rolon en laboro.

Nun 21 000 diversaj fakuloj, kies 49% ricevis edukon kaj trejnadon en lokaj lernejoj, laboras en Tibeto kun areo de pli ol 1.2 milionoj da kvadrataj kilometroj.


Estas malmultaj analfabetoj kaj duon-analfabetoj el la tieaj oficistoj kun tibetanoj kiel la ĉefa parto. Laŭ la statistiko en 1984, inter la tieaj ŝtatoficistoj 7 595 diplomiĝis el superaj lernejoj, t. e. 14.7% de la ŝtatoficistoj, 13 877 el teknikaj mezlernejoj, t. e. 26.9% de la ŝtatoficistoj. Kun la kresko de kultura nivelo rimarkinde plialtiĝis la kvalito de la ŝtatoficista vicaro kaj ne plu estas analfabetoj-gvidantoj en la diversnivelaj postenoj.

Sŭolang Dŭoĝji de la Grena kaj Olea Prilaborejo de Lhasa estas unu el ili.

La 31-jara Sŭolang Dŭoĝji iam lernis en la Eksperimenta Elementa Lernejo de Lhasa kaj poste lernis du jarojn en la Grenprilabora Lernejo de Uhan. Diplomiĝinte, li fariĝis teknikisto de la prilaborejo. Kun fakaj scioj kaj bona atingo en laboro post nelonge li estis promociita kiel vicestro de la produkta oficejo de la prilaborejo. En 1981

Novaj domoj de la mezlernejo Baji

Foto de ĈENG ŜJI



li fariĝis vicestro de la prilaborejo kaj oktobre de 1984 ĝia estro. Sub lia gvido la administrado de la prilaborejo estas en bona ordo kaj leviĝas ĝiaj produktovaloro kaj profito.

En la malnova socio Tibeto havis nur dekkelkajn lernejojn, inkl. de tiuj oficialaj kaj privataj. Ili kulturis neniun fakulon, krom religioj. Tiam la tibetaj analfabetoj superis 99% de la totala loĝantaro.

Oktobre de 1950, nelonge post kiam Ĉamdo de Tibeto estis liberigita, la Ĉina Popola Liberiga Armeo fondis la Ĉamdo-an Elementan Lernejon. En 1952, ĈPLA eniris Lhasa kaj konsiliĝis kun la loka registaro de Tibeto por fondi la Lhasa-an Elementan Lernejon. La tiama komandanto de la Tibeta Milita Regiono kumulis la oficon de ĝia unua estro. Poste, en Ŝigaze, Gjangze, Njingĉi, Jadong, Dengĉen kaj aliaj lokoj fondiĝis elementaj lernejoj. Kvankam tiam la nove fondita popola respubliko ankoraŭ havis ekonomiajn malfacilojn, tamen ĝi donis favoran stipendion al malriĉaj lernantoj. La diversnivelaĵoj de Tibeto loĝigis senhejmajn infanojn en lernejoj por ilia lernado.

En septembro de 1956 oficiale fondiĝis la Lhasa-a Mezlernejo situanta post Potala-palaco. Ĝi estis la unua mezlernejo en la tibeta historio. Nemalmultaj mezaĝaj kaj junaj laborantoj en diversaj profesioj kaj fakoj de Tibeto estas elkulturitaj de la lernejo.

Post du jaroj fondiĝis la Tibeta Publika Lernejo en Ŝjanjang, Ŝenŝji-provinco (Tiam ĝi estis la plej alta lernejo de Tibeto kaj provizore fondiĝis en la urbo pro la tibeta postĝinteco en edukaj kondiĉoj).



Studentoj de la Tibeta Universitato en fizika eksperimentado
Foto de TUDENG

Ĝis la fino de 1959, Tibeto havis 462 elementajn lernejojn kun pli ol 16 300 lernantoj kaj 580 instruistoj kaj oficistoj, kaj du mezlernejojn kun 342 lernantoj kaj 42 instruistoj kaj oficistoj. Tio metis bazon por plua disvolviĝo de la tibeta eduka afero.

En 1959 efektiviĝis en Tibeto la demokratia reformo por komplete aboli la servutulan sistemon, kio multe akcelis la disvolviĝon de la tibeta eduka afero. Kiam fondiĝis la Tibeta Aŭtonoma Regiono en 1965, la nombro de la elementaj lernejoj en Tibeto proks. kvaroble pli grandiĝis ol tiu antaŭ la demokratia reformo, kvaroble kreskis la nombro de la lernantoj kaj 3.28-oble pliĝis la nombro de la instruistoj kaj oficistoj, duobliĝis la nombro de mezlernejoj, triobliĝis respektive la nombro de lernantoj kaj tiu de instruistoj kaj oficistoj. Surbaze de la Tibeta Publika Lernejo fondiĝis en 1965

la unua tibeta alta lernejo — la Tibeta Nacieca Instituto. Tio komencis preludon de la alta eduka afero en Tibeto.

Ja ne estis glata la vojo de la tibeta eduka afero. En la “kultura revolucio”, kiu alportis al la ĉina popolo gravan perdon, difektiĝis la tibetaj lernejoj, malordigis la eduka sistemo kaj serioze reduktiĝis la eduka kvalito. Nur post la finiĝo de la ĥaoso en 1976, la tibeta eduka afero denove surpaŝis la vojon de sana disvolviĝo.

Dank' al la necesaj reguligoj kaj reordigo, en la lastaj jaroj fundamente eliminiĝis la difektiĝo alportita de la “kultura revolucio” kaj multe fortiĝis la fundamenta eduko kaj tibet-lingva instruado. La tibeta eduka departemento postulis, ke la mezaj kaj elementaj lernejoj bone faru la tibet-lingvan instruadon kaj la altaj lernejoj bone funkciigu la tibet-lingvan fakultaton. Nun la



Vicprofesoro de la angla lingvo s-ro Morse (meze), la unua fremdlanda instruisto de la Tibeta Universitato, inter gestudentoj

Foto de TUDENG

elementaj lernejoj en la tibetaj agrikultura kaj paŝta regionoj uzas la tibetan lingvon en instruado, ankaŭ la mezaj kaj elementaj lernejoj en la tibetaj urboj fortigis la tibet-lingvan instruadon.

La tibeta eduka departemento kompilis lokajn instruajn materialojn en la tibeta lingvo laŭ la tibetaj cirkonstancoj. Estas streĉe farata de post 1976 la tradukado de la tutlandaj unuigitaj instruaj materialoj en la tibetan lingvon. Nun finiĝis la kompilado de lernolibroj por la elementa lernejo kaj baldaŭ finiĝos tiu por la elementa kaj supera mezlernejoj.

Samtempe kun tio, la tibeta alta eduko jam havis ĝojindan disvolviĝon. En la 20-a de julio, 1985 fondiĝis en Lhasa la Tibeta Universitato kun sep fakultatoj kaj 15 fakoj. Dank' al klopodo dum pli ol 30 jaroj unuapŝe formiĝis kompleta eduka

sistemo en Tibeto. Tibeto nun havas ne nur universitaton, sed ankaŭ agronomian kaj brutobredan kaj naciecan institutojn, 13 teknikajn mezlernejojn, 2 475 elementajn lernejojn kun pli ol 125 400 lernantoj kaj 55 mezlernejojn kun 18 800 lernantoj.

Tamen pro la disa loĝado kaj maloportuna trafiko sur la monda tegmento ne tre multaj el la lernaĝaj geknaboj estis en lernejoj kaj la lernantoj malfacile persistis en la lernado. Por ke la geknaboj havu ŝancon esti edukitaj, en la 1-a de septembro, 1985 la tibeta registaro komencis funkciigi en malproksimaj kaj landlimaj regionoj pensionajn lernejojn, en kiuj ĉiu elspezo de la lernantoj estas pagata de la ŝtato. Tio reduktis la ŝarĝon de kamparanoj kaj paŝtistoj, stimulis ilian aktivecon partoprenigi siajn gefilojn en lernado kaj senigis la lernantojn je peniga piedirado. Nun pli ol 32 000 infanoj lernas en tiuj pensionaj

elementaj lernejoj. Ili konsistigas 25% de la totala nombro de elementaj lernantoj.

En la pasintaj pli ol 30 jaroj, kvankam la tibeta eduka afero disvolviĝis rapide, tamen ĝi ankoraŭ ne povas kontentigi la bezonon de la tiea konstruado. Pro tio la ĉina registaro sendas plue al Tibeto instruistojn el landinternaj lokoj por fortigi la instruistan vicaron de Tibeto kaj postulis, ke 16 landinternaj provincoj kaj municipoj difinu po mezlernejojn por funkciigi tibetan kurson kaj kulturaj fakulojn por Tibeto. Somere de 1985 Tibeto elektis 1 300 diplomitojn de elementa lernejo kaj sendis ilin al la 16 landinternaj mezlernejoj por ilin perfektigi.

La nova generacio de tibetanoj kun diversflankaj scioj estas en kreskado. Estas espereble, ke la nova generacio sur la tibeta altebenaĵo skribos la plej brilan paĝon en la tibeta historio.



Elementlernejoj en festo Foto de ĈENG ŜJI

*Instruisto de la Tibeta Agronomia kaj
Brutobreda Instituto donas lecionon.*

Foto de JŪAN KEĜONG





Instruisto de la mezlernejo Baji helpas lernantojn en ilia lernado.

Foto de ĈENG ŜJI



Tibet-nacieca instruistino

Foto de ĈENG ŜJI




Post la lernohoroj
Foto de MA ĜINGĈIU



Ŝjarba-aj diplomitaj studentinoj Foto de ĈENG ŜJI

Infana parko en Lhasa Foto de MA ĜINGĈIŬ



EL REALA VIVO DE ĈINIO

EN AKVORIĈA LOKO

Fotoj de CAJ HAJFENG




Surakva familio



Ĝojo en tetinkejo



Vinujoj kun desegnaĵoj




Domo ĉe ponteto

Originala pejzaĝo ĉe vilaĝo

En la lasta Printempa Festo mi venis al la antikva urbo Ŝaŭŝing en suda Ĉinio. Antaŭ 2 500 jaroj Jŭe-regno prenis ĝin kiel sian ĉef-urbon. Ŝaŭŝing ĉarmas per siaj montoj kaj riveroj. La akvosurfaco konsistigas 37.4% de la totala agraro. Pli ol 300 pontetoj interligas ĉiujn vilaĝojn. Por viziti parencojn aŭ amikojn oni uzas boatojn, kies remiloj estas movataj per piedoj. La tieaj viroj ŝatas ni-gran feltan ĉapon kun randa supro kaj supren-kuspebla rando. Ĝi estas varmokonserva, pluvimuna kaj okulŝirma.

La stratoj punktiĝis de tetrinkejoj kaj drinkejoj, kie oni povas sin refreŝigi. Mi restis tie nur kelkajn tagojn, tamen la tieaj pontetoj, ŝtonplataj vojoj kaj homoj kun feltaj ĉapoj impresis min neforgeseble.





Riparado de vinujoj




En foiro




Remado per piedo






En drinkejo

Foto de ĈEN ŜIN



Lunĉejo de etmanĝaĵoj



Snurtordado



En fiŝista familio

Tricent-jara apoteko Tongjentang

Nemalproksime sude de la vasta Tjan'anmen-placo estas movoplana komerca strato Daŝilan, kie sidas la tre fama apoteko Tongjentang de ĉina farmacio.

Tongjentang estas unu el la plej malnovaj apotekoj en Pekino. Ĝi fondiĝis en 1669, kaj la fondinto Jŭe Zunju iam servis en kortega hospitalo, kaj pro tio estis oportune por li kolekti multajn antikvajn receptojn kaj tiujn aplikatajn ĉe la kortego kaj

la popolo. Lia apoteko Tongjentang estis privilegiita je liverado de medikamentoj al la kortega apoteko, kaj poste je preparo de medikamentoj por la imperiestra familio.

En la pli ol tricent jaroj, la apoteko ĝuis la famon per sia preparado de diversaj piloloj, kuracpulvoroj, plastroj kaj granoloj. Inter ĝiaj pli ol 400 specoj de medikamentoj la plej famaj estas la piloloj *Angongniŭhŭang*, *Suheŝjang*, *Zajzaŭ*, *Dahŭolŭo*,

Niŭhŭang-ĉingŝin, *Njuĝin*, *Ŝen-ĵong-ŭejŝeng*, *Ĝjufangĝibaŭ*; la kuracpulvoro *Ziŝjŭe* kaj tigrosta vino.

La tdadicia pilolo *Angongniŭhŭang* de Tongjentang havas historion de pli ol 200 jaroj. La ingrediencoj de la pilolo estas tre multekostaj rino-cera korno, mosko, perlo k. s. La pilolo efikas kontraŭ alta febro, komato, delirado, konvulsio kaj similaj. Estis malsanulo, kiu febris svene 14 tagojn pro infektiĝo de vundo. Sed kiam li prenis la pilolon *Angongniŭhŭang*, tuj malaperis la febro.


Same fama estas la pilolo *Uĝjibajfeng* speciale kontraŭ virinaj malsanoj. La ĉefa ingredienco estas blankfeniksa koko. Tia koko surhavas neĝe blankan plumaron tamen karbe nigrajn haŭton kaj karnon.

La pilolo *Uĝjibajfeng* estas farita ĝuste el la karno kaj osto de tia koko, ginsengo, angeliko, cervokorna gelateno kaj aliaj multekostaj drogoj.

En antikva libro estas notite, ke en Tang-dinastio (618-907 p. K.) jam aperis la pilolo *Bajfeng*, kiun oni opiniis panacea por virinaj malsanoj. En Ĉing-dinastio (1644-1911 p. K.), surbaze de la sperto akumulita de antaŭuloj, la kortega hospitalo reviziis la recepton de la pilolo *Bajfeng*, kaj difinis la preparadon al Tongjentang. La pilolo estis liverata ekskluzive al la edzino kaj kromedzinoj de imperiestro.

Tongjentang-apoteko





Valoraj medikamentoj produktitaj de Tongjintang

En 1981 oni hazarde trovis en la antaŭa kortega apoteko de la Imperiestra Palaco du pilolojn, kiujn postlasis la imperiestra patrino Ciŝji antaŭ pli ol 100 jaroj. La blanka vaksa globeto de pilolo konservata en brokata skatoleto aspektas kiel delikata trezoro. Maltegite, la piloloj estas brilaj, forte odorantaj kaj ankoraŭ efikaj kontraŭ malsanoj.

Ginsengo, kiel la reĝo de la herba mondo, ĉiam estas rigardata de ĉinaj medicinistoj kiel la plej tonika drogo. La fama antikva farmakologo Li Ŝiĝen (1518-1593 p. K.) alte taksis ginsengon en sia verko "Ben Caŭ Gang Mu", ke ginsengo fortigas la internaĵojn, kvietigas palpaciojn, akriĝas la vidadon kaj refreŝigas la memoron.

Tongjintang vendas diversajn bonkvalitajn ginsengojn. Iuj sovaĝaj ginsengoj kostas mil ĵuanojn por ĉiu gramo, iuj kulturataj nur kelke da ĵuanoj. Ĉiujare la apoteko sendas spertajn farmaciistojn al la Nord-oriento por aĉeti ginsengojn kaj poste prilaboras ilin en varojn.

La tigro estas la plej kruela rabobesto, tamen ĝia osto estas altvalora drogo. Vino-maceraĵo de tigra osto bone efikas kontraŭ

Preparado de Uĝi-bajfeng-piloloj

La vino-maceraĵo de tigra osto de Tongjintang estas preparita el pli ol 140 specoj da drogoj kaj tra ĉ. 50 procedoj. Post kelkvara konservado la koloro kaj gusto de la vino fariĝas tre agrablaj. La vino bone efikas kontraŭ paraliziĝo de la membroj, doloro je la talio kaj piedoj kaj lezo. La vino estis premiita en 1924 en la Lepsika Foiro.

Krom tio, Tongjintang produktas ankaŭ aliajn salubrajn vinojn, ekzemple, *Gŭogong*, *Ĉjongĝjang*, *Ĵuji*, *Jinĉen* k. a.

La medikamentoj de Tongjintang ĝuas renomon unue pro ĝiaj apartaj receptoj. Krom antikvaj kaj popolaj, Tongjintang havas ankaŭ receptojn el kortego skribitajn de eminentaj kuracistoj.

Cetere la drogoj uzataj de Tongjintang estas kvalite garantiataj kaj zorgeme elektitaj en la produktejoj de la drogoj. La prilaborado estas rigore kontrolata.

La preparado de medikamentoj de Tongjintang estas tre delikata. Ĝi estas tradicia kaj serioze farata. Ekzemple, dum pre-



parado de kontraŭ-febra medikamento pulvoro *Ziŝjŭe*, oni devas meti oron en poton de ŝtonecaj drogoj kaj ilin dekokti, por ke la elemento de oro miksiĝu kun la drogoj. Cetere la apoteko dufoje kribras la pulvoron per tre densa kribrilo, por ke ĉiu pilolo enhavu egalan kvanton da ingrediencoj.

Tongjintang rigore observas la tradician manieron en preparado de medikamento, kaj samtempe plurfoje reviziis la receptojn kaj specojn, akcentis la farmacian studon, reformis la malnovajn instrumentojn, meĥanizis aŭ duonmeĥanizis multajn procedojn en produktado. Dank' al tio, altiĝas la kvalito kaj kvanto de medikamentoj, kaj senĉese kreiĝas novaj specoj de medikamentoj.

Tongjintang konsistas el medikament-preparejo, ekstraktejo, vinfarejo kaj vendejo kun pli ol 2 000 laboristoj kaj oficiistoj. Dank' al sia racia administrado kaj kontentiga servado, Tongjintang allogas al si sennombrajn klientojn ĉinajn kaj alilandajn.

PALEO- ANTROPOLOGO ĜJA LANPO



S-ro Ĝja Lanpo Foto de CAŬ BAJLONG

La dua de decembro, 1929 estis ne ordinara tago en antropologio. Ĝuste en tiu tago Pej Ŭengong trovis la unuan fosilian kranion de "Pekinaj Homoj" sur la monto Longgu de Ĝoŭkoŭdjan ĉ. 50 km. sudokcidente de Pekino. La trovo donis elokventan ateston pri la teorio "fizika laboro kreis la homojn". Kaj en la sekvinta duonjarcento oni elfosis pli ol 40 homajn fosiliajn skeletojn unu post alia. La abundeco kaj amplekseco de la elterigitaj fosiliaj skeletoj de "Pekinaj Homoj" estas senprecedencaj kompare kun tiuj en la sama periodo en la mondo.

Inter la en- kaj eksterlandaj sciencistoj Ĝja Lanpo estas la

sola esploristo, kiu plej longe laboris sur la ruino de "Pekinaj Homoj" en Ĝoŭkoŭdjan.

"MI KRESKIS EN LA HEJMO DE PEKINAJ HOMOJ"

En 1931, kiam Ĝja Lanpo komencis partopreni la prifosadon en Ĝoŭkoŭdjan, li, 23-jara, estis mezlerneja diplomito. Nun li estas mondfama paleontologo, geologo, paleoantropologo kaj membro de la Ĉina Akademio de Sciencoj. Li ofte diris: "Mi kreskis en la hejmo de 'Pekinaj Homoj'". Li, 78-jarulo, ankoraŭ klare memoras pri la trovo de la fosiliaj kranioj de "Pekinaj Homoj". Tio okazis en malfrua aŭtuno. Blovis frosta vento kaj

nigraj nuboj kovris la tutan ĉielon. Oni devis ĉesi labori, sed Ĝja Lanpo ankoraŭ gvidis siajn laborantojn en fosado ĉe la oka kaj naŭa tertavoloj. La 15-an de novembro, je la naŭa iŭ elfosis oston. Ĝja Lanpo tuj konsciis la trovon grava kaj post observado li konstatis ke ĝi estas peco de homa kranio. Posttagmeze de la sama tago ĉe la apuda loko oni trovis alian dispecigitan kranion, kiun li atente kungluis. La 26-an de novembro, je la naŭa Ĝja Lanpo trovis la trian homan kranion, sufiĉe bone konservitan. Li tuj portis ĝin al Pekino.

Post kiam Pej Ŭengong trovis la unuan kranion de "Pekinaj Homoj" en 1929, la miraklo de

tri trovoj de kranioj de "Pekinaj Homoj" refoje faris sensacion en la diverslandaj sciencistaj rondoj. Pro liaj brilaj kontribuoj en paleoantropologio, oni enlistigis lin en la "Vortaro de la Monda Antropologio", eldonita en 1938, Vaŝingtono. Tiam li aĝis nur 29 jarojn.

Dank' al la esplorado de Ĝja Lanpo kaj aliaj pri la paleoantropologio, oni jam havas pli profundan sciencan scion pri la "Pekinaj Homoj". Antaŭ 700 000 jaroj ĝis 200 000 jaroj la "Pekinaj Homoj" loĝis en granda kaverno ĉe la norda deklivo de la monto Longgu de Ĝoŭkoŭdjan. La kranio de "Pekinaj Homoj" karakteriziĝas per malalta kaj plata fruntalo kaj dikaj kaj kunligantaj brovaloj. La kranio estas duoble pli dika ol tiu de la nuna homo, ĝia cerbo estas malpli granda meze je 20 procentoj ol tiu de la lasta. La "Pekinaj Homoj" jam povis labori laŭvole per ambaŭ manoj, kiel la nuna homo. La malsupraj membroj estis iom kurbiĝaj, sed jam havis la formon de la nuna homo kaj, sendube, ili povis rekte stari, iri kaj eĉ kuri.

La "Pekinaj Homoj" povis fari krudajn ŝtonajn instrumentojn kaj ĉasi bestojn. Amasoj da cindroj en la kaverno sciigas al ni, ke tiuj prahomoj scipovis uzi fajron. Oni supozis, ke ili ankoraŭ ne povis esti fajron, sed nur konservi.

La "Pekinaj Homoj" vivis eble 20-30-ope. Ilia socia organizo estis en la stadio de fratecaj familioj. Pro la mizera vivo ili travivis ĝenerale malpli ol 30 jarojn. La difektitaj kranioj elfositaj montras, ke tiutempe eble furoris hommanĝo.

LI DEVENIS DE KAMPARANA FAMILIO

La 25-an de novembro, 1908, Ĝja Lanpo naskiĝis en ordinara kamparana familio, en Jutjangubernio, Hebej-provinco. En sia infaneco li lernis en privata kurso. Post kiam lia patro trovis oficon en Pekino, lia familio transloĝiĝis tien. Pro la malmulta enspezo de sia patro, Ĝja Lanpo vizitis elementan kaj mezgradan lernejojn per stipendio. Post la diplomitiĝo el mezgrada lernejo li komencis memlernadon. De sia infaneco li interesiĝis pri historio, des pli pri naturaj sciencoj. Ĉiufoje kiam li renkontis malfacilan problemon, li do iris al biblioteko por konsulto. Li ne havis monon por aĉeti librojn kaj ofte iris al vendejo de malnovaj libroj por citi gravajn fragmentojn. Post iom da tempo li konatiĝis kun iu komizo, kiu poste fariĝis lia bona amiko kaj permesis al li porti librojn al sia hejmo. Dank' al sia diligenta lernado li bone kleriĝis. En 1931 li eniris en la Ĉinan Geologian Esploran Instituton kiel metilernanto kaj laboris en Ĝoŭ-

koŭdjan sub gvido de la fama arkeologo Pej Ŭengong, kio determinis lian postan vojon. Krom labori en Ĝoŭkoŭdjan li faris ankaŭ aliajn subĉielajn laborojn. La laborkondiĉoj estis malfacilaj: Ili devis tranokti en hotelaĉo, eĉ en kaverno kaj iam havis nenion por manĝi. Multaj el ili ne povis elteni la tedan kaj malfacilan vivon kaj forlasis la laboron unu post alia. Sed Ĝja Lanpo ekamis la aferon.

En la komenco li sciis nenion pri geografio kaj arkeologio. Li do uzis preskaŭ ĉiun horon postlaboran por lerni, inkl. de la feriaj tagoj kaj festoj. Li kunportis ofte en sia poŝo ostopecojn por palpe rekoni ilin. Dank' al sia diligenteco li grandpaŝe progresis. En 1935, kiam Pej Ŭengong veturis al Francio por studi, Ĝja Lanpo kiel vicesploristo gvidis la elfosan laboron en Ĝoŭkoŭdjan.

ESPLORO PRI LA PALEOLITIKA KULTURO

De la kvindekaj jaroj Ĝja Lanpo turnis sian atenton de

Ĝja Lanpo (maldekstre) esploranta prahoman fosilion



Ĝoŭkoŭdjan al aliaj lokoj, precipe al la paleolitika kaj la kvaternara geologio en norda Ĉinio. Elfosado de la paleolitikaj ruinoj en Ŝanŝji- kaj Ŝenŝji-provincoj estis lia ĉefa studobjekto.

Lantjan-gubernio de Ŝenŝji-provinco situas en la sudorienta parto de la faŭlta valo de la riveroj Fenhe kaj Ŭejhe. Sude de ĝi staras Ĉinling-montaro kaj norde Liŝan-monto. Dum pli ol 60 milionoj da jaroj ekde la komenco de kenozoiko Ĉinling-montaro kaj Liŝan-monto leviĝis kontinue, rezulte de tio formiĝis baseno inter ili, kun malkovriĝintaj sedimentaj tavoloj pli ol 1 300 m. dikaj. La tavoloj trapasis pli ol 50 milionojn da jaroj. Tiu komplete konservita sekco malofte vidata en Ĉinio estas ideala loko por geologa studo pri kenozoiko. En ili riĉe enteriĝis la fosilioj de vertebruloj, el kiuj estis delonge malaperintaj antikvaj bestoj.

De la sesdekaj jaroj Ĝja Lanpo gvidis la esplortaĉmenton al tiu ĉi loko kaj trovis dentajn kaj kraniajn fosiliojn de rektetaraj

homoj antaŭ miliono da jaroj. Geologoj nomas ilin "Homoj de Lantjan". Ĝja Lanpo kaj aliaj sciencistoj opinias, ke la "Homoj de Lantjan" vivis pli antikve ol la "Pekinaj Homoj". Ilia produkta nivelo estis malpli alta ol tiu de la "Pekinaj Homoj", tamen ili povis fari krudajn ŝtonajn ilojn kaj uzi fajron. Tio estas grava eltrovo de la ĉinaj paleoantropologoj post la trovo de la "Pekinaj Homoj".

En la komenco de la sepdekaj jaroj Ĝja Lanpo, Gaj Pej kaj Long Juĝu elmetis teorion, ke la paleolitika kulturo en norda Ĉinio konsistas almenaŭ el du sistemoj, t.e., Kehe-Dingcun-sistemo kaj la sistemo de Ĝoŭkoŭdjan(ruino de la "Pekinaj Homoj")-Ĝiju, kaj eksplikis la daŭrigan rilaton de la ĉina primitiva kulturo. La kulturo de la "Homoj de Lantjan" apartenas al Kehe-Dingcun-sistemo.

En 1978 Ĝja Lanpo publikigis sian traktaĉon pri la origino kaj dislokiĝo de la neolitika kulturo. Li montris, ke la neolitika kulturo en la mondo povas esti

dividita en du sistemojn. Unu el ili estas en Ĉinio, la nordorienta Azio kaj la Norda Ameriko kun norda Ĉinio kiel la centro; la alia en Eŭropo kaj Afriko kun la Mediteranea regiono kiel la centro. La teorio interesas la internacian arkeologan rondon. Usonanoj opiniis ke la teorio "ludus gvidan rolon por la arkeologio en la Norda Ameriko".

Ĝja Lanpo diligente kultivas en sia studkampo kaj verkis multe. Li publikigis sume pli ol 300 traktaĉojn kaj 23 fakajn verkojn (inkluzive de tiuj verkitaj kune kun aliaj). Nemalmultaj el ili estas eldonitaj angle, japane, germane kaj hispane, kiel "Ĝoŭkoŭdjan — hejmo de la 'Pekinaj Homoj'", "Prahistoriaj Loĝantoj sur la Ĉina Kontinento" k.s.

Lastatempe Ĝja Lanpo invitite faris sciencan esploron kaj prelegojn en Japanio, Alĝerio, Svisio kaj aliaj landoj. Li estas fame konata kaj respektata de siaj eksterlandaj kolegoj pro siaj erudicio en arkeologio, rigora sinteno al scienco kaj eminentaj atingoj.

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: 1 internacia respondkupon por 5 vortoj aŭ mallongigoj. **Por fotoj:** 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

* Tadeusz Zalewski, Lublin 50, skr.poczl.84, Pollando, dez. kor. pri aŭtoj, junulara muziko kaj mod-vestoj.

* Esperanto Klubo de York (nova klubo) serĉas korespondantojn. Adreso: La Esperanto Klubo, c/o Guppys Enterprise Club, 17 Nunnery Lane, York, Britio.

* Dez. kor. pri esperantologio. Bomuslav Havlik, R. A16/77, Janov Litvinov, ĈSSR.

* Dorota Pakosz (17-jara), ul. Dworcowa 49, 47-217 Raszowa k/Kozla, Opolskie, Pollando, dez. kor.

* 20-j. knabino dez. kor. pri literaturo kaj diversaj temoj france, hungare kaj Esperante. Fazakas Jzabella. Dealul-frumos Nr. 56, 4214 Ditrău, Harghita, Rumanio.

* Infanoj (8-15-jaraj) dez. kor. tutmonde. Skribu al: S-ro Otto Kern, Juesholzstrato 8, D-3420 Herzberg/Harz, FR Germanio.

* Esperanto Klubo de Nikaragvo fondiĝis en 1984 kaj dez. kor. tutmonde. Adreso: s-ro Eddy Silva Molina, Clinica santa Maria 3 cuadras al sur, P.O. San Jose Oriental, Managva, Nikaragva.

KURANTAJ AFEROJ

SUKCESA LOKIĜO DE ĈINA TELEKOMUNIKA KAJ DISAŬDIGA SATELITO

Je la 17-a horo de la 20-a de februaro aplika telekomunika kaj disaŭdiga satelito lanĉita de Ĉinio en la 1-a sammonate akurate sin lokis super la ekvatoro je 103 gradoj de la orienta longitudo. Normale laboras la instrumentoj kaj ekipaĵoj en la satelito kaj bone iras ĝiaj telekomunika, disaŭdiga kaj televid-transsenda laboroj. Baldaŭ la satelito estos transdonita al oficiala uzo. Tiu sukceso montras, ke Ĉinio bone posedis la teknikon fari, lanĉi, mezuri kaj regi transportajn raketojn, ke ĝia satelita komunikado transiris de eksperimenta stadio al aplika stadio, kaj ke ĝi akiris novajn sukcesojn en la kosmonaŭtika kaj elektronika teknikoj.

DUOBLIĜIS LA POKAPA NETA ENSPEZO DE LA ĈINAJ KAMPARANOJ

Laŭ statistiko de la Ŝtata Statistika Buroo de Ĉinio la pokapa neta enspezo de la ĉinaj kamparanoj atingis 397 jŭanojn en 1985, kaj tiu en 1980 191.3 jŭanojn. Tio rezultis el la reformado kaj plena mobilizo de la aktiveco de la kamparanoj por disvolvo de produktado. Nun ne estas alta la

pokapa neta enspezo de la ĉinaj kamparanoj. Ili nur solvis la problemon de vivteno. Por fariĝi bonhavaj, ili devas pli diligente labori.

ĈINIO OKUPIS LA KVINAN LOKON EN LA MONDO EN PRODUKTOKVANTO DE ELEKTRO

En la 36 jaroj post la fondiĝo de la nova Ĉinio la elektra industrio rapide disvolviĝis kaj kun pli granda rapideco disvolviĝis en la lastaj jaroj. La produktokvanto de elektro de Ĉinio en 1957 estis 19 300 000 000 kilovatthoroj kaj okupis la dektrian lokon en la mondo, tiu en 1978 estis 256 550 000 000 kilovatthoroj kaj okupis la sepan lokon en la mondo kaj tiu en 1985 atingis 408 500 000 000 kilovatthorojn, 90-oble pli multe ol tiu de 1949, kaj okupis la kvinan lokon en la mondo.

GRANDA EFIKO DE LA AKVOBARAĜO GEĜOŬBA

Erĝjang-elektrejo, ĉe la akvoutiliga pivota konstruaĵo Geĝoŭba sur Jangzi-rivero, produktis sume 23 965 000 000 kilovatthorojn da elektro de junio 1981 ĝis la fino de 1985. Kalkulate laŭ la norma elektro-prezo, ĝia totala produktov valoro atingis 1 559 000 000 jŭanojn, je 63% kiom la investita sumo por la unuaperioda konstrua-

do de Geĝoŭba kaj je 34% kiom tiu por la tuta konstruado.

Oni taksis, ke post la ekfunkciado de la dek kvar generatoraroj de Daĝjang-elektrejo, la totala produktov valoro de elektro en 1989 atingos 4 848 000 000 jŭanojn, kiom la tuta investita sumo por la akvobaraĵo Geĝoŭba.


ĈINIO HAVAS 1 046 000 000 LOĜANTOJN

Jam pasis la cikloinfluo de la unua naskokulmino en la 50-aj jaroj en Ĉinio. En la periodo de 1981-1985 Ĉinio sukcese plenumis la taskon regi la loĝantaron kreskadon difinitan de la Sesa Kvinjara Plano. La nombro de la ĉina loĝantaro kreskis de 987 050 000 en la fino de 1980 al ĉ. 1 046 000 000 en la fino de 1985, kiel oni taksis. La totala nombro de la loĝantaro ne superis 1 060 000 000, kiel difinite de la Sesa Kvinjara Plano, kaj la kreskinta nombro reduktiĝis je ĉ. 14 000 000.


SUKCESA REKUNIGO DE DEK ROMPITAJ FINGROJ

Lastatempe ostologoj de la Unua Hospitalo sub la Ŝjian-a Kvara Armea Medicina Universitato sukcese rekunigis dek rompitaĵojn. La 27-an de januaro tranĉmaŝino derompis la dek fingrojn de la 20-jara presistino Ŭang Futaŭ pro perturbo de la ŝaltilo.

Regadejo de satelito-lanĉejo, provizita per grandaj komputiloj



Transporta raketo antaŭ ekflugo




La ostologoj en du grupoj tuj faris operaciojn al ŝiaj manoj samtempe sur du operaciaj stabloj. Post pli ol 20 tagoj da postoperacia kuracado kaj flegado la sango en ŝiaj dek fingroj bone cirkulas, la vundoj cikatriĝis rapide kaj la fingroj fariĝis rozkoloraj kaj povas movetiĝi.

RIMEDO KONTRAŬ NAZOFARINGA KANCERO

Nazofaringa kancero estiĝis en kaŝita parto de la nazofaringo. Kiam montriĝas simptomoj, jam estas malfrue. Kiamaniere diagnozi la fruan nazofaringan kanceron por sensuferigi la malsanulojn? La esplora sekcio gvidata de prof. Zeng Ji en la Virusologia Instituto sub la Ĉina Akademio de Preventa Medicino, kunlaborante sep jarojn kun aliaj kuracaj organizoj, faris surlokan esploron unuafojan en la mondo kaj ekzamenis specialan antikorpon en la homa korpo per imunoenzimologia rimedo. Per tiu rimedo iuj homoj povas esti frue enlistigitaj kiel plej danĝeraj malsanuloj kaj poste daŭre ekzamenataj, ĉar simptomoj helpantaj finan klinikan diagnozon aperas nur kvin jarojn poste. Tiamaniere oni povas trovi suferantojn de frua nazofaringa kancero. Tiu rimedo levis la procentaĵon de trovitaj fruaj kanceruloj de 32% al 92% kaj multe reduktis la mortokvanton. La atingo estis ekspertizita en la 14-a de februaro en Pekino.

Erĝjang-elektrejo ĉe Geĝoŭba



DEK EMINENTAJ MONDAJ SPORTISTOJ ELEKTITAJ DE ĈINIO

La Centra Televida Stacio de Ĉinio, la Ĉefurba Ŝtala Kompanio kaj la redakcio de la gazeto "Nova Sporto" kune iniciatis la aktivadon elekti 10 eminentajn mondajn sportistojn por 1985. La rezulto de la elektado publikiĝis en la 1-a de marto. La elektitoj estas premiitaj en Pekino.

Ili estas Lang Ping (ĉina flugpilkistino), Micheal Gross (naĝisto de FR Germanio), Steve Cram (brita atleto), Serguei Bubka (sovetia atleto), Naim Suleimanov (bulgara halterlevisto), Nje Ŭejping (ĉina veĵĉiisto), Juri Korolev (sovetia gimnasto), Igor Paklin (sovetia atleto), Martina Navratilova (usona tenisistino) kaj Andrea Ehrig (rapidsketistino de GDR).

La juĝkomitato ricevis ĉ. 168 000 balotilojn el diversaj lokoj de Ĉinio kaj el Usono, Japanio, Koreio, Filipinoj, Gvajanio kaj Hongkong.

PLI OL 400 CIGNOJ TRAVINTRIS EN ŜINGĜANG

Pli ol 400 cignoj bone travintris en la Cigna Lago sur Bajanbulakstepo de Ŝingĝang kaj neniu el ili mortis.

La lago kune kun la stepo, rivero, marĉo kaj fonto en la ĉirkaŭaĵo kovras areon de ĉ. 1 000 kvadrataj kilometroj. Ĝi situas en la ba-

seno profunde de Tjansan-montaro. La loko havas humidan klimaton kaj abundas je pluvo. Ĉiun printempon tien alflugas dek miloj da cignoj el malproksima suda regiono unuj post aliaj. Tie ili konstruas nestojn kaj kovas ovojn kaj re-flugas suden arope, kiam ekneĝas.

En 1980 la regiono Bajanbulak estis difinita kiel rezervejo. Post tio koncerna departemento starigis tie gvatturon por protekti cignojn, publikigis proklamon kun la sama celo kaj kreis por ili sekurajn vivkondiĉojn.

MALJUNULEJO POR EKSTERLANDANOJ


Maljunulejo por eksterlandanoj en Harbin en nordorienta Ĉinio konstruiĝis en 1954 per investo de la ĉina registaro. Ĝi senpage vivtenas eksterlandajn kaj sennaciajn maljunulojn en Ĉinio. Dum la pasintaj pli ol 30 jaroj proksimume 1 000 tiaj maljunuloj pasigis feliĉan tempon.

Nun tie vivas 14 senparencaj maljunuloj el Sovetunio, Japanio, Koreio kaj Usono. El ili la plej aĝa estas 90-jara sovetia virino, kiu jam vivis pli ol dek jarojn tie.


ĈINIO EN TURISMA FOIRO DE OKCIDENTA BERLINO

Ĉinaj turismaj organizoj unuafoje partoprenis en la 20-a Okcident-Berlina Turisma Foiro inaŭgurita en la lasta tagdeko de februaro, kun partopreno de 2 130 turismaj organizoj el 142 landoj kaj regionoj. La foiro estas konata kiel mondaj turismaj "olimpikoj".

En la foiro Ĉinio starigis standojn de la Ŝtata Turisma Buroo, la Ĉina Civila Aviada Administracio, la Internacia Turisma Servo, la Junulara Turisma Servo, la hotelo "Blanka Cigno" kaj la Ĉina Restoracio en Kantono. Per sia aparta stilo ili altiris multajn vizitantojn.



Ŭang Futaŭ sin ekzercas por reakiri la funkcion de la rekunigitaj fingroj, helpe de kuracisto.



La deromptaj fingroj

LA FILMO "LEŬSO" PREMIITA EN LA INTERNACIA FILMOFESTIVALO

En la Kvina Havaja Internacia Filmofestivalo la ĉina filmo "Leŭso" ricevis premion de la Centro de Orienta-Okcidenta Kultura kaj Teknika Interŝanĝo kaj teknikan premion de elstara Kodak-filmoproduktado de orientanoj. La filmo priskribas la malriĉajn kaj suferoplenajn kamparanojn de la montvilaĝoj en norda Ŝenŝji, Ĉinio, fruintempe de 1939.

La festivalo estis iniciatita de la usona Centro de Orienta-Okcidenta Kultura kaj Teknika Interŝanĝo. En la juĝaktivado partoprenis 38 rakontaj, 50 dokumentaj kaj iuj aliaj mallongaj filmoj el 16 aziaj landoj kaj pacifikaj regionoj.

PLI DA EKSTERLANDAJ ARTAJ TRUPOJ LUDAS ĈIJARE EN ĈINIO

En 1985, 42 artaj trupoj venis en Ĉinion. Ilia ludo bone akcelis la prosperiĝon kaj disvolviĝon de la ĉina kultura kaj arta aferoj. Ĉijare Ĉinio invitas ĉefe voĉmuzikajn trupojn kaj artistojn. La pli atentiga inter la artistoj estos premiitoj de la internacia kanta konkurso "Sinjorino Papilio" okazigita en Japanio. Tiuj premiitoj

el Italio, Usono kaj Sovetunio venos al Ĉinio por fari kunan prezentadon.

Februare la Baslera Baleta Troupo de Svisio prezentis en Ĉinio "Singardeman Virinaĉon" kaj aliajn baletojn ŝatatajn de la ĉinaj spektantoj.

PENTRAĴOJ DE HENRI CUECO KAJ PIGNON-ERNEST EKSPONITAJ EN ĈINIO

De februaro ĝis aprilo la Ĉina Kompanio por Ekstera Eksponado okazigis sinsekve en Pekino, Kantonon kaj Kunming ekspozicion de pentraĵoj de la famaj francaj modernaj pentristoj Henri Cueco kaj


Pignon-Ernest. La ekspozicio estis bonvena al la vizitantoj.

Pentraĵoj de Henri Cueco estas rigardataj de la artaj-teoriaj rondoj kiel skolo de politik-komenta esprimo aŭ tiu de nova esprimo. Liaj ekspoziciaj fontas plejparte el la vivo. Li provis per siaj verkoj vaste imagigi la rigardantojn.

La ĉefa arta trajto de Pignon-Ernest estas kopii grandajn verkojn per silka filtro-presado kaj alglui ilin ĉe strato en aparta etoso. Malsamaj strataj spektakloj ofte fariĝis ĉeftemo de lia pentrado.

Henri Cueco kaj Pignon-Ernest estas memfaritaj pentristoj kun elstaraj artaj atingoj.

En la ekspozicio de pentraĵoj de Henri Cueco kaj Pignon-Ernest



GLUMARKOJ POR LA 71-A UK

Por celebri la 71-an UK, la redakcio de "Entomologia Taksonomio", fondita kaj redaktata de la fama ĉina veterana esperantisto kaj entomologo Chou Io, projektis kaj presigis serion de glumarkoj ĉin-Esperantaj el 12 pecoj kun verda kaj nigra koloroj. La desegnaĵoj kaj vortoj esprimas fortan volon de ĉinaj sciencistoj-esperantistoj pri disvastigo de Esperanto en scienc-teknika kampo.



Glumarko por la 71-a UK

ESPERANTAJ LIBROJ PER KREDITO DE LA MONDA BANKO AĈETITAJ

La Daljan-a Politekniko mendis Esperantajn librojn de pli ol 300 specoj, uzante krediton de la Monda Banko, kaj pli ol cent specoj estis portitaj en la politeknikon. Esperanto-movado viglas en tiu ĉi altlernejo. Oni instruas Esp. kiel nedevigan lernobjekton. Vicprofesoro Ŝaŭ Jong kompilis Esperantan lernolibron por natursciencaj kaj teknikaj altlernejoj kaj li mem donas lecionojn al kursanoj, inter kiuj estas tri instruistoj kaj tri esplorist-studentoj.

INFORMO EL JAN'AN

Jan'an estas sankta revolucia loko de Ĉinio. En la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito (1937-1945) ĝi estis unu el la lokoj,

kie viglis Esperanto-movado. Sed en la pasintaj jaroj la tiea Esp-movado progresis malrapide. Nun de tie ni ricevis ĝojigan informon: fonetika kurso de Esperanto ekfunkciis en Jan'an kaj ĝin partoprenas pli ol 30 personoj. Tio estas la unua Esperanto-kurso en Jan'an post la fondiĝo de la nova Ĉinio en 1949.

ESPERANTO EN FREMD-LINGVA KLUBO

La Fremdlingva Klubo de Siĉŭan estas en Ĉengdu, la ĉefurbo de la provinco. En ĝiaj aktivadoj oni uzas ses fremdajn lingvojn inkluzive de Esperanto. Helpate de samideanoj de la Esperanto-Asocio de Ĉengdu, oni ekfunkciigis rapidan Esperanto-kurson. Post kiam anonco de tiu klubo montriĝis en "Chengdu Wanbao" (Ĉengdu-a Vespera Ĵurnalo), multaj interesiĝas pri Esperanto.

PRIVATA LIBROSERVO ESPERANTA

En Ŝenjang, ĉefurbo de Ljaŭning-provinco, ekfunkciis privata Esperanta libroservo. Ĝi estas en


komerca kvartalo de la urbo. Ĉi tie oni povas aĉeti "El Popola Ĉinio", "La Mondo", aliajn Esperantaĵojn kaj Esperantajn sonbendojn.

LA AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCIOJ KOMENCIS LAŬSTATUTE LABORI

Antaŭ du jaroj la neformala "Internacia Scienca Kolegio" okazigis la unuan "Sanmarinan Universitatan Sesion" cele al stariĝo de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) en la pitoreska ĉefurbo San Marino de la samnoma respubliko. La 13-an de septembro 1985 okazis la dua "Sanmarina Universitata Sesio", en kiu partoprenis pli ol 80 sciencistoj kaj per kiu la Akademio Internacia de la Sciencoj post sia oficialigo komencis laŭstatute labori.

La plejmulto de la partoprenantaro venis el la germana kaj itala lingvoregionoj, sed inter la altranĝuloj de AIS la jugoslavo kaj hungaroj estis la plej forte reprezentataj. Ĝin ĉeestis ankaŭ du profesoroj de la Pekina Normala Uni-

La aktiva esperantisto s-ro Nils Alua-Eksten (la unua de maldekstre) de Svedio kaj kantistinoj



versitato kaj unu de la Nacia Universitato de Rosario el Argentino. La oficialaj lingvoj de AIS nun estas Esperanto, la angla, franca, germana kaj itala. Ne nur la kursoj, sed ankaŭ la plejmulto de la prelegoj okazis internacilingve.

Dum SUS 2 elektigis la Senato de AIS, kiu konsistos dum la venontaj 4 jaroj el la profesoroj Ĉen Jŭan (Ĉinio), Muziĉ (Jugoslavio), Neergaard (Danlando), Pancer (Jugoslavio), Pennacchietti (Italio), Popoviĉ (Jugoslavio) kaj Frank (FR Germanio), kiun la Senato elektis kiel prezidanton por kvar jaroj kaj profesoron Pennacchietti kiel vicprezidanton. Elektigis ankaŭ la kvar unuaj dekanoj: Muziĉ por la kibernetika, Pennacchietti por la kulturscienca, Popoviĉ por la formalscienca kaj Neergaard por la naturscienca sekcioj.

SUS 3 okazos 1986-08-31/09-08 en la sama lando kaj SUS 4 tie komenciĝos la 27-an de decembro.

BROŝURETO PRI URBO ELDONITA

Bela urbkoniga broŝureto kun aldonitaj Esperanto-klarigoj sen-

koste haveblas je: Verkehrsamt, Kirchplatz, D-7063 Welzheim, FR Germanio.

VARBSTAMPILO POR ESPERANTO

Ekde la 2-a de januaro 1986 funkcias varbstampilo de la aŭstra poŝto, kiun subvenciis la Aŭstra Ministerio por Trafiko. La teksto estas (tradukita): Esperanto/internacia lingvo/internacia Esperanto-muzeo en Wien.

LA 9-A ESPERANTOLOGIA KONFERENCO

Kadre de la 71-a UK en Pekino okazos la 9-a Esperantologia Konferenco. La kadra temo estas "Internacieco de Esperanto el neeŭropa vidpunkto".

Estas bonvenaj prelegoj pri la temo, ne pli ol 20-30 minutaj. La konferenco celas prilumi la ecojn de Esperanto aparte, se eble, kompare al nehindeŭropaj lingvoj.

Tre gravas pro tio la kontribuo de nehindeŭropaj prelegantoj, kiuj estas aparte bonvenaj.

Proponojn por kontribuoj bv. sendi al d-ro Detlev Blanke, DDR-1141 Berlin, Otto-Nagel-Str. 110, Pf. 113-05.

MONATO

internacia magazino sendependa

UNIKA REVUO EN ESPERANTO

Vere alternativa laŭ multaj aspektoj.

Unu el la plej prestiĝaj
esperanto-revuoj


Inform-riĉa, bele ilustrita.

Petu inform-materialon de:

MONATO, Frankrijklei 140
B-2000 Antwerpen, Belgio.

Solvoj:

- I. fontoplumo, krajono, kreto.
- II. liniaro.



*Geesperantistoj de
GDR kaj ĈSSR en
sia "JEPRE'85"*

LASTA VOLO DE URBESTRINO

(Mikronovelo)

Ŝi kuŝis en lito, kun la torso alte subtenata de kapkusenoj, tamen la spirado malfacila. La buŝo larĝe malfermita. La vizaĝo pala kiel kalko.

Antaŭ la lito staris kuracisto, flegistinoj, ŝia sekretario, la edzo, la filino lernanta en elementa lernejo kaj reportero.

La kuracisto sin klinis super ŝian korpon, atente aŭskultis ŝian korbataĉon, poste sin rektigis malrapide, ekrigardis al la brakhorloĝo kaj ĵetis al la sekretario rigardon facile kompreneblan.

Ĉu ŝi foriros tiele? Oni ne kuraĝis kredi. Ŝi, energioplena, malpli ol 45-jara, estis kompare juna en la magistrato. Du jarojn kun iom pli sur sia posteno, la urbestrino alportis nemalgrandajn ŝanĝojn al la malgranda

apudrivera urbo: purajn stratojn de la urbeto, duobligitan produktovaloron de la urbo, nove konstruitajn latrinojn, kvankam bagatelajn tamen nepre necesajn. . . Ŝia energio estis elĉerpita por la urbeto.

Ŝi ne devis foriri tiel frue. Se ne okazus la inundo, nek breĉiĝus la digo. . .

Baldaŭ ŝi foriros. Ŝi senbrue foriros kuŝante hejme, en la lito. En la ĉambro regis melankolio.

Ŝi ne volis fermi la okulojn. Lumis la duonfermitaj okuloj, jen lumo de serĉo kaj deziro. La lipoj moviĝetis sugestante pri io rimarkigi.

La apudstarantoj sentis perpleksecon. Ili ĉirkaŭrigardis la ĉambron por trovi ion de ŝi serĉatan, kio povos konsoli la koron baldaŭ ripozontan.

La sekretario montris al ŝi ŝian kutiman mansakon, en kiu estis diversaj dokumentoj de ŝi subskribitaj, sed ŝiaj okuloj restis malfermitaj.

La kuracisto donis al ŝi kelke da tablojdoj, sed ŝi eĉ ne palpebrumis.

Eble por aŭdi ian brilan testamentan vorton, la reportero klinis sin al ŝia buŝo, sed li nenion aŭdis.

Ĉiuj malesperiĝis: kiu povas diveni la sekreton en la koro de la plej alta magistratano?


Ŝia edzo senparole kondukis al ŝi la filineton Fangfang. Subite vigleto ekradiis sur ŝia vizaĝo. Ekmoviĝis la falinta mano kaj malfacile kaptis la baskon de la filino, poste ŝi fermis la okulojn. . .

La reportero leĝere malaltigis la kapkusenojn, kaj ĉe tio oni vidis verdkovrilan notkajeron sub la kapkusenoj. Oni malfermis ĝin kaj trovis tagnotojn skribitajn en la tagoj de batalo kontraŭ inundo. La lasta skribaĵo estis: "Vespere alkudri butonojn por Fangfang."

Ĉies rigardo falis sur la veston de Fangfang kaj oni trovis, ke mankis al la vesto du butonoj. Ĉiu klare memoris, ke ŝi falis en inundo ĝuste en tiu tago.

Larmoj en ĉies okuloj. Oni vidis ne nur bravan urbestrinon, sed ankaŭ mildan patrino!

(Esperantigita de Ŭang Ŝijong)



第二十四课
Dudekkvara Leciono

在百货商店里
En Magazeno

Ofte uzataj vortoj

您要买什么

买点丝绸怎么样

您替我挑一挑

您喜欢什么颜色

您满意吗

一米多少钱

nín yào mǎi shénme

mǎi diǎn sīchóu zěnmeyàng

nín tì wǒ tiāo yī tiāo

nín xǐhuan shénme yánsè

nín mǎnyì ma

yī mǐ duōshao qián

kion vi volas aĉeti

aĉetu iom da silkajo, ĉu bone

elektu por mi

kia koloro plaĉas al vi

ĉu vi estas kontenta

kiom kostas unu metro

Dialogo

A: 先生, 您要买什么?

A: Xiānsheng, nín yào mǎi shénme?

sinjor-, vi vol- aĉet- kio

A: Kion vi volas aĉeti, sinjoro?

B: 我想买点中国特产。

B: Wǒ xiǎng mǎi diǎn Zhōngguó tèchǎn.

mi vol- aĉet- iom Ĉini- produktaĵ-

B: Mi volas aĉeti iom da ĉinaj produktaĵoj.

A: 您买点丝绸怎么样?

A: Nín mǎi diǎn sīchóu zěnmeyàng?

vi aĉet- iom silkaj- kiel

A: Aĉetu iom da silkajo, ĉu bone?

B: 请您替我挑一挑。

B: Qǐng nín tì wǒ tiāo yī tiāo.

bonvol- vi por mi elekt-

B: Bonvolu elekti por mi.

A: 您喜欢什么颜色?

A: Nín xǐhuan shénme yánsè?

vi ŝat- kia kolor-

A: Kia koloro plaĉas al vi?

B: 红的、绿的都可以。

B: Hóngde, lǜde dōu kěyǐ.

ruĝ-, verd- ĉiuj taŭg-

B: Taŭgas kaj la ruĝa kaj la verda.

A: 这种颜色您满意吗?

A: Zhèzhōng yánsè nín mǎnyì ma?

ĉi tiu kolor- vi kontent- ĉu

A: Ĉu vi estas kontenta pri ĉi tiu koloro?

B: 很好。请问一米多少钱?

B: Hěn hǎo. Qǐng wèn yī mǐ duōshao qián?

tre bon-. bonvol- demand- unu metr-
kiom mon-

B: Tre bone. Pardonon, kiom kostas unu metro?

A: 十七元。

A: Shíqī yuán.

dek sep ĵuan-

A: Dek sep ĵuanojn.

B: 我还想买点瓷茶具。

B: Wǒ hái xiǎng mǎi diǎn cí chájù.

mi ankaŭ vol- aĉet- iom porcelan- te-
servic-

B: Mi volas aĉeti ankaŭ porcelanan servicon por teo.

A: 请到瓷器部去选购。

A: Qǐng dào cíqìbù qù xuǎngòu.

bonvol- ir- porcelan- vendej- elekt- aĉet-

A: Bonvolu elekti kaj aĉeti en la vendejo de porcelanaĵoj.

Statuo de militisto-servisto kaj skulptita kapo de bodisatvo

de ĈJAŬ ŬENGENG

KIU KRESKAS PLEJ RAPIDE?

(Fizika eksperimento)

Materialoj: Kvar malgrandaj florzavoj kun kruda sablo, delikata sablo, argilo kaj humo respektive kaj 20 florsemoj.

Metodoj: Dividu la florsemojn en 4 partojn, semu ilin en la 4 florzavoj, ofte akvumu ilin (sed ne tro multe) kaj metu la florzavojn en lokon iom kovritan. Post kiam la ŝosoj elteriĝas, metu la florzavojn en la sunlumon kaj ilin akvumu. Mezuru ĉiutage la alton de la ŝosoj kaj notu la altecon. Ĉesigu la observadon antaŭ ol sterki kaj komparu la rezultojn; tiam vi rimarkos, ke la florsemoj en humo kreskas plej rapide.

Kaŭzo: En la komenco de semĝermo la nutraĵo de la semoj en si mem povas kontentigi la bezonon de la ŝosoj. Post kiam elkreskas la unua paro da verdaj folietoj, ili bezonas nutraĵon el la tero, kaj la humo entenas plej multe da nutraĵo.

La nomitaj ŝtonskulptaĵoj estis faritaj en Tang-dinastio (618—907 p.K.) kaj elterigitaj en 1959.

La statuo, alta je 89 cm. kaj larĝa je 54 cm., estas farita el sola blanka ŝtono. Ĝia ora tegaĵo preskaŭ tute defalis. La statuo, kiel budhisma artaĵo de la dinastio, estas versimila kun tri kapoj kaj ok brakoj kaj portanta bidojn sur la kolo kaj rubandojn sur la brakoj. Ĝi havas nudan supran parton. Ĝi tenas en la manoj rozariojn, tigrotimigan stangon, po-

kalon kaj mes-muzikilon en formo de lotusfloro. La dekstra kaj maldekstra kapoj estas ĝiaj transformiĝintoj.

Ankaŭ la kapo de bodisatvo estas skulptita el blanka ŝtono. La bodisatvo kun brovoj kurbaj kaj vizaĝo karnodika kaj bela havas altan harligon sur la kapo kaj portas orajn ringojn sur la oreloj. La aŭtoro per tradicia ĉina arto kaj fremdlanda skulpt-maniero kreis la skulptaĵon montrantan la belecon de Tang-dinastia virino.

ENIGMOJ

I

Antaŭ ol paroli, la unua demetas sian ĉapon,

Antaŭ ol paroli, la dua estas tranĉita,

Falas neĝflokaj, kiam la tria parolas.

(Tri skribiloj)

(Solvoj troveblaj en ĉi numero)

II

Fluas kvin riveretoj,
kie naĝas amaso da ranidoj,
Antaŭ ili muzikiloj ludiĝas,
laŭ ili oni kantas.

(Solvo trovebla en ĉi numero)

Klarigoj:

1. 要 uzata antaŭ verbo esprimas la volon aŭ intencon por fari ion.
2. 挑一挑: Kiam oni ripetas iun verbon, oni intermetas la vorton “一” (unu) por monti la mallongecon de ago kun nuanco de provo.
3. 都可以: 都 esprimas la totalecon.



*Skulptita kapo
de bodisatvo*



Statuo de militisto-servisto

8157

乙丑年春正月
李廣利姜友峰合画



世界语《中国报道》一九八六年第六期（本刊代号：二—一九一五）北京市期刊登记证第692号